

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kĉ 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administreto: Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono 718/VIII. La manuskriptoj oni ne resendas.

KORAN SALUTON AL LA I. ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO ESPERANTISTA SENDAS „LA PROGRESO“

LA ĜENEVA KONFERENCO.

Dum la daŭro de nia movado ne okazis tiom grava kunveno, kiel estas sendispute la konferenco kunvokita de la fama pedagogia instituto de J. J. Rousseau al Ĝenevo dum la tagoj 18.—20. aprilo t. j. Oni povas diri, ke tie ĉi neniu el la partoprenintoj intencis prezenti iun festan, sed en have por nia movado negravan, paroladon. Kontraŭe, ĉiuj partoprenintoj — spertuloj el 28 nacioj, inter kiuj estis oficialaj reprezentantoj de 16 diversŝtataj ministerioj — penis ĉi tie kiel eble plej simplice kaj sen paradaj aldonoj prezenti siajn spertojn akiritajn per instruado de esp. en lernejoj. La konferencanoj prezentiĝis tie ĉi, kiel eminente seriozaj pioniroj de Zamenhofa ideo, penante dum siaj ses kunsidoj trovi vojon gvidantan al ĝenerala enkonduko de esp. en lernejojn de la civilizita mondo. Ni esperas, ke la klopodoj de la konferencanoj ne restos senrezultaj — se niaj instruistoj scios bone utiligi la rezultatojn de la konferenco. Por ni estas fakto tre ĝojiga, ke — kvankam oni agis tre singardeme kaj memkritike — oni povis konstati, ke ni estas jam en la tempo, kiam kun sukceso oni povas insisti pri komenco de sistema oficiala instruado de esperanto en lernejoj de kulturaj ŝtatoj.

La konferenco estis malfermita de prof. P. Bovet, direktoro de instituto de Rousseau per la unua kunsido, okazinta en la »vitra salono« en la palaco de la

»Ligo de nacioj«. La unua parolanto estis Sir Eric Drumond, ĝen. sekretario de la Ligo de nacioj, kiu diris interalie, ke la konferenco helpos kompletigi materialon pri la stato de esp. movado prezentotan al la tria kunsido de la Ligo, okazonta la venontan aŭtunon. Poste tuj sekvis la raportoj pri la stato de esp. instruado en diversaj landoj. (Resume ni enpresas ĝin en alia parto de nia gazeto.) Kaj ankaŭ la aliaj kunvenoj prezentiĝis kiel kunsidoj vere laborantaj. Detale oni trastudis dum ili ĉiujn rezultojn devenintajn el la instruado de esp. al infanoj kaj la prezentitajn spertojn oni resumis en jena manifestacio:

Manifesto al la instruistaro tutmonda.

Ni edukistoj el 28 landoj kaj oficialaj delegitoj de 16 registaroj kunveninte en la Sekretariejo de Ligo de Nacioj en Ĝenevo, frate salutas niajn kunlaborantojn en la tasko lumigi la mensojn de la homoj.

Ni asertas nian konvinkon, ke la fundamento de la nuna bedaŭrinda stato, en kiu la civilizita mondo troviĝas, estas tiu malkompreno kaj malfido, kiu dividas la popolojn unu de alia.

Ni asertas nian konvinkon, ke la sola certa kuracilo kontraŭ tiu ĉi malbono estas eduko al homeco kaj efektivigo de la principo de internacia alproksimiĝo, por kiu staras Ligo de Nacioj.

Ni rigardas kiel unu el la plej valoraj kontribuoj al la solvo de la problemo de mondrekonstruo la internacian helplingvon Esperanto, kaj asertas nian konvinkon, ke ĝi flanke de la naciaj kulturilingvoj devas fariĝi parto de la eduka programo en ĉiu civilizita lando.

Ni deziras konigi al vi la rezulton de nia sperto en la instruado de Esperanto en multaj diverslandaj lernejoj.

Ni konstatis, ke Esperanto estas tute sufiĉa por praktika uzado kiel internacia lingvo, por ĉiuj celoj parolaj aŭ skribaj, al kiuj lingvo estas bezonata; krom tio ĝi posedas rimarkindajn ecojn, kiuj pruvas ĝian valoron, kiel ilo eduka.

Ĝi valoras, kiel helpo por la ĝusta uzado de la gepatra lingvo. Tio montriĝas per la plibonigo de la gepatralingva prononco kaj elparolo, pli bona efekto de vortoj, pli preciza scio de vortsignifoj

kaj pli klara kompreno de gramatikaj principoj.

Esperanto faciligas la akiron de lingvoj modernaj kaj klasikaj, faciligante la taskon kaj ŝparante al tempon de la instruisto, klarigante la gramatikajn formojn, liverante internaciajn vortradikojn, kaj kutimigante la menson de lernantoj esprimi sin en pli ol unu lingvo.

Laiŭ nia opinio, Esperanto devas estis instruata al infanoj kiel unua lingvo post la gepatra, kaj enkondukata jam en la unuagradan instruprogramon. Ĝi provizus la lernanton, kiu devas frue eliri el la lernejo, per sufiĉa scio de dua lingvo praktike uzebila. Ĝi montrus, ĉu tiuj, kiuj eniras duagradan instruon posedas kapablon por plia lingvostudado kaj ĝi sendus ilin al tiu lerno kun mensoj pretigitaj al tio. Ĝi ebligus, sekve, ŝparadon de tempo kaj pli bonajn rezultatojn en la ellernado de lingvoj. Lernantoj nekapablaj en la lingvostudado povus sin fordoni al pli konvenaj studoj.

Ni konstatis, ke scio de Esperanto vekis ĉe niaj lernantoj pli realan konon kaj ŝaton de geografia, mondhistorio kaj eĉ morala edukado, pli grandan kaj pli simpatian intereson pri fremdaj popoloj, pri ties kutimoj, literaturo kaj arto. Esperanto edukas infanojn al tutmonda paco kaj profundigas en ili idealon de Ligo de Nacioj. Tio ĉi efektiviĝas precipe per intersanĝo de leteroj, ilustritaj poŝtkartoj kaj desegnaĵoj inter infanoj diverslandaj, per legado de internaciaj gazetoj en Esperanto, kaj per studado de fremdaj literaturoj. Lernantoj povas korespondi jam post kelkmonata studado. La avantaĝo morala de tiu ĉi multlanda korespondado estas tre granda.

Per du unuhoraj lecionoj ĉiusemajne la lernantoj povas akiri en unu jaro tion praktikan konon de la lingvo, kian en iu alia lingvo estas tute neeble atingi en tri jaroj.

Ni submetas ĉi tiun manifeston al via serioza konsiderado, kaj kore rekomendas al vi akceli la instruadon de Esperanto en via lando, ne nur pro ĝia utileco por komerco, scienco kaj ceteraj fakoj

de internacia agado, sed ankaŭ pro ĝia valoro morala, kiel incitilo al tiu amika interrilatado de la popoloj de la mondo, kiu estas la vera celo de Ligo de Nacioj.

Genevo, 20an de aprilo 1922.

Tiu ĉi solena dokumento estu de niaj esp. societoj komunikita al ĉiuj Lernejoj konsilantaroj kaj al gravaj pedagogiaj institutoj!

oooo

PROLOGO

de B. Tittl al la partoprenintoj de esp. vesper-festo aranĝita antaŭ la II. konferenco de okcident-bohemaj esperantistoj.

(Boheme.)

Sinjoroj kaj sinjorinoj!

Estas tradicia kutimo de esperantistoj, dum iliaj festoj memori la kreinton de la internacia helplingvo Esperanto, kaj tiom pli ni devas tion fari hodiaŭ, ĉar antaŭ tri semajnoj forpasis kvin jaroj de lia morto.

Kultura homo ne povas forgesi sian dankemon al tiu, kiu predikis ideojn al li karajn kaj tial ankaŭ ni, esperantistoj, neforgesos nian dankemon al tiu, kiu kreis nian movadon, dediĉinte sian tutan junagŝon eĉ sian tutan vivon al ideo de homamo, al ideo de fratiĝo de popoloj.

Kvin jaroj forpasis de la tempo, kiam en trankvila tombejo de Varsovio oni entombigis la restojn de tiu, kiu havis kaj havos gravan efikon je rilatoj internaciaj.

FELIETONO

B. TITTL:

MISS ANNIE.

Hazardo kunvenigis nin. Ĝi estis antaŭ pli ol tri jaroj, kiam mi vizitadis amerikan hebreinon por paroli kun ŝi angle. Kaj tie mi konatiĝis kun ŝi, la ruĝvanga blondulino, kiu por la sama celo venadis tien. Ŝi estis gaja, tre bonkora kaj mi ne scias pro kiu kaŭzo ŝi eksentis al mi plenan konfidon. Komence, post la konversacia horo, ŝi senpere iris al tramo kaj veturis hejmen. Sed jam post du, tri semajnoj ŝi diris al mi: »Akompanu min, miiros piede.« Kaj tiel komenciĝis nia amikeco. Ŝi loĝis en periferio de nia urbo kaj tial dum la vojiro ni povis diri al ni tre multe.

Jam la unuan fojon ŝi rakontis al mi, ke ŝi havas konatecon kun sinjoro, sed ĝi ne alportas al ŝi multe da feliĉo. Li estas filo de fabrikisto kaj ŝi estas malriĉa. Ŝia patrino ne volonte vidas tiun konatecon, ĉar ŝi kredas, ke ili neniam fariĝos geedzoj. Ŝi jam iel amikiĝus kun la penso de disiro, sed li ploras, ĵuras, ke alian knabinon li neniam amos kaj se ŝi decidus la disiron, li sin mortigos. En tiu situacio forpasis jam tri jaroj da ilia konateco, sed ŝanĝo ne venas.

Mi evitis eldiri mian opinion pri la afero, ĉar mi ne ŝatas enmiksiĝi en privatajn aferojn kaj krom tio mi ne konis persone ŝian amanton. Ŝi rimarkis mian sindetenen kaj de tiu tempo ne plu parolis pri tiu afero.

Forpasis jaro da dummilita suferado. Dume nia amikeco elkreskis, kaj mi estis jam bone konatiĝinta kun familia situacio de l' belulino, kiun mi simple nomis »Miss Annie«. En la lastaj tri jaroj mortis tri membroj de tiu familio: la patro kaj du fratinoj. Vivrimedojn por la restintaj kvin familiemembroj nun perlaboris ŝi kaj unu frato, kiu estis laboristo. Ŝi estis oficistino de Skodafabriko.

Unu tagon post nia angla konversacio mi denove akompanis mian amikinin al ŝia loĝejo kaj veninte antaŭ la domon, ni estis jam atendataj de juna sinjoro. Ĝi estis ŝia amanto. »Permesu al mi, sinjoroj, ke mi foriru«, ŝi diris post nelonga hezito kaj adiaŭis. Ni restis solaj. »Mi deziras paroli al vi, sinjoro«, alparolis min la junulo kun voĉo forte tremanta. Ni ekiris en proksiman parkon kaj veninte tien, mi petis la junan viron komenci la parolon. Post kelkfoja ekĝemo li ekparolis. Li amas la blondharan knabinon jam tri jarojn per sia tuta koro, per sia tuta animo, sed en la lasta tempo li trovas eĉ ne momenton da feliĉo kaj la vera kaŭzo de tio estas mi. Tion mi ekkomprenis el liaj vortoj parolataj tiom mallalte, ke mi

Ni memoras lin hodiaŭ kaj samtempe kun li ni memorigas al ni la bravajn kunlaborintojn liajn, kiuj preparis la vojon al ideo de Zamenhof.

Unu greka fabelo diras, ke inter Grekoj estis viroj, kiuj mortiginte strangajn monstrojn, al la homaro faris novajn vojojn tra profundaj praarbaroj, elsekigis marĉojn kaj humiligis la obstinecon de la naturo. Kaj tiuj viroj la Grekoj nomis herooj. Tiajn heroojn havas ankaŭ ni, esperantistoj, ĉar ankaŭ ili devis krei novajn vojojn tra dezerto netrairebla, ankaŭ ili devis fruktigi marĉon de apatio kaj de inerteco.

Kiu scias prezenti al si, kia antipatio kontraŭ la lingvo internacia ekregis post falo de Volapük, la unua nesukcesinta provo pri la lingvo internacia, tiu komprenos, kiom da entuziasmo kaj da kuraĝa persistemo estis necese, por starigi esp. movadon sur la ŝtupon, kie ĝi nun staras. Niaj herooj ne lasis sin timigi per malfacileco de sia laboro, feliĉe ili kunlaboris kaj faris fakton el neebleco.

Se Zamenhof kaj liaj kunlaborintoj, kiam ili komencis sian laboron, lasus sin timigi per malhelaĵoj, se ili pro laciĝo kaj pro malespero post unuaj malsukcesoj estus forĵetintaj la armilon unufoje prenitane, tiam la esperantistoj ne formus jam hodiaŭ malgrandan nacion, kiu honorigas sian Majstron. Se ni, esperantistoj, nun formas malgrandan nacion, pri kiu scias kaj sin

apenaŭ lin aŭdis. Kiam li finis, lia paliĝinta vizaĝo sin turnis al mi kaj liaj okuloj ŝajnis avide atendi mian respondon.

Mi bone komprenis lian doloron, bazitan sur erara opinio. Per trankvilaj vortoj mi priskribis al li la rilatojn inter mi kaj lia amatino. Mi diris, ke mi neniam penis malfortigi ilian amon, kvankam la sorto de la bona knabino ĉiam min interesos, ĉar mi ne volas kredi, ke ĝi evoluos por ŝi kontentige.

Post tiu klarigo mi adiaŭis kaj foriris. La anglan konversacion mi ne plu partoprenis en la societo de Miss Annie, ĉar mi forveturis por kelka tempo. Post tri monatoj mi sciigis, ke ŝi trovis novan postenon en unu nordbohemia urbo. En ĉiutagaĵ zorgoj mi tute forgesis mian iaman amikinin kaj kiu scias, ĉu mi iam estus rememoriginta ŝin. Sed la letero, kiun mi antaŭ ne longe ricevis, vekis en mi la pensojn pri Miss Annie. La letero estis skribita maŝine kaj sub la lasta linio mi trovis sian subskribon. Kvazaŭ pikilo penetrus en la koron, tiel estis al mi, kiam mi legis: »...La vortoj, kiujn Vi iam al mi diris, nun efektiviĝis. La maljuna sinjoro invitis min veni al li kaj postulis, ke mi liberlasu lian filon de la promeso, ĉar li neniam permesos mian geedziĝon. Li diris, ke alia afero estus, se mi ricevus dote almenaŭ

interesiĝas la tuta civilizita mondo, tiam ĝi estas merito de dro. Zamenhof kaj de liaj kunlaborantoj.

(Esperante.)

Samideanoj, ne ĉiu el ni povas esti granda politikisto, ne ĉiu povas esti fama verkisto aŭ granda generalo, sed ĉiu povas honeste labori en la rondo, en kiu li mem vivas, ĉiu el ni povas vekti la dormantojn kaj admoni skeptikulojn por la profito de humaneco, de internacia homamo. Mi nun demandas vin: ĉu ankaŭ vi faris vian devon por kreskigo de internacia kompreniĝo kaj homamo, por kresko kaj disvastigo de Esperanto? Se ĝis nun vi tiel ne faris aŭ faris nur nesufiĉe, tiam korektu vian ĝisnunan agadon. Estu malhonoro al tiu esperantisto, pri kiu oni povas diri, ke li oferis eĉ ne unu kronon, ke li varbis eĉ ne unu novan adepton por la movado, al kiu Zamenhof dediĉis sian tutan vivon!

Zamenhof estis ne nur bona amanto de sia patrujo, sed ankaŭ sincera amanto de la tuta homaro, granda bonfaranto ĝia, granda heroo sur la kampo de la Spirito. Ni konservu lin, amikoj, en dankoplena memoro. Ion mi volas ankoraŭ menciiti tie ĉi: Kiam Zamenhof kaj liaj amikoj komencis sian propagandan laboron, ili post ĉiu paŝo renkontis malkomprenon kaj mokon. Sed ili ne malesperis, kontraŭe,

milionon da kronoj. Mi lasis alvoki lian filon kaj demandis pri lia opinio. Kaj ĉu Vi scias lian respondon? Li diris, ke li tute ne intencas edziĝi je mi, ĉar li devas obei la patron, kiu estas lia pandonanto kaj fine li aldonis — eble pro tio, ke li volis bati tien, kie ĝi doloras plej multe: „Vi ja eĉ ne rajtas edziniĝi, ĉar vi estas el ftizula familio!” ... Tion li diris al mi post nia sesjara konateco, post ses jaroj, kiujn li al mi prenis. Kaj tiam antaŭ unu monato li ankoraŭ promesis al mi nunjare certe edziĝi kun mi... Mi lasis lin libera, kaj li edziĝis la sekvantan tagon kun filino de grandbienulo. Hieraŭ mi estis ĉe kuracisto kaj li konsilas al mi veturi en Italion. Mi timas, ke baldaŭ efektiviĝos la vortoj de mia iama fianĉo...«

La letero de Miss Annie per si mem estus efika fino de la priskribata historieto. Sed la fino estas jena: Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis anoncon, ke Miss Annie mortis.

Tiu ĉi historio estas tute vera. Ĝi prezentas veran tipon de senkora kaj senhonesto kapitalisto — kiu vivas en Plzeň. Li estas esperantisto (danke al dio, nur laŭnoma) kaj kiam li legos mian rakonton, li eble ekridos facilanime. Sed mi dezirus, ke li almenaŭ por momento perdu sian nesentemon kaj li meditu...

ili laboris kun tiom pli granda fervoro. Se ili estis herooj de la spirito, tiam mi diras, ke senhonora estas tiu, kiu ankoraŭ nun povas dubi pri absoluta venko de Zamenhofa lingvo, kiam miloj kaj centmiloj estas kolektiĝintaj kun entuziasmo sub la verda standardo de esperantismo.

Tial, amikoj, ni havu unu komunan devizon: Neniam perdi paciencon kaj neniam perdi esperon ke ni venkos! Ankoraŭ nin atendas granda kaj peniga laboro antaŭ ol ni venos al nia celo, sed per nia amo al la afero ni venkos ĉion!

oooo

JAN HAVLASA:

ŠTEFÁNIK SUR TAHITI.

La 4. majon 1919 okazis terura malfeliĉo: Milán R. Štefánik, eminenta astronomo en servoj de franca registaro, fidela kunlaboranto de T. G. Masaryk kaj la unua ĉs. ministro de nacia defendo, revenante post la mondmilito en la liberigitan Slovakion, ĉian maskiĝlandon, estis mortigita per terura akcidento: dum malsupreniro li frakasiĝis kun sia aeroplano. Ni enpresas memoaron de J. Havlasa, la konata vojaĝisto bohema kaj poste ambasadoro de Ĉs. Resp. en Brazilio, pri la vivo de Štefánik sur la insulo Tahiti.

En junio 1910 mi renkontiĝis sur Tahiti, ambaŭ surprizitaj pro tiu subita revido post longaj jaroj, ĉar ni ne vidis nin de niaj universitataj studoj, kaj mi tiom pli surprizita pro la ĝenerala ŝatado, kiun Štefánik ĝuis ĉe la francaj oficoj koloniaj. Štefánik estis sendita de la francaj Akademio kaj registaro por konstrui super Papeete*) steloobservejon kaj observi tie la preteriron de Halleya kometo.

Komence tiu aŭ alia el plej altrangaj oficoj elmontris ne sufiĉe da bonvolo por tiu aŭ alia arango de Štefánik; finfine Štefánik estis juna kaj de negranda korpo kaj li ne estis Franco. Sed kiam ajn Štefánik renkontiĝis kun iu malbonvolo por siaj sciencaj bezonoj, ĉiam li havis ĉe la mano iun ne atenditan kaj por birokrate spirito ofte teruran atuton. Tia gubernero povis por momento pensi ke li elmontras troan bonvolemon al la juna sciencisto, se li helpas al li en iu afero. La modesteco kaj »gentlemaneco« lin erarigis kaj kiel ĉe birokratoj ofte okazas, li fariĝis iam eĉ nekomplezema. Sed vere nur por momento. Ne ekzistis homo, kiu baldaŭ ne estus bedaŭranta ke li malhelpis, eĉ nur iomete, al Štefánik. Iu teruriga, neatendita dokumento eliris el la poŝto de la astronomo kaj la kara birokrato terurigita subite konstatis, ke tio, kion li opiniis esti bonvolo kaj komplezemo farita al Štefánik, laŭvere estis

lia devo kaj ke Štefánik en certaj rilatoj estis lia superulo.

Mirindaj estis la konoj de Štefánik kaj neniu povis esti certa, ke tio, kion li modeste petas en intereso de la scienco estas laŭvere lia rajto, kiun li, se li volus, povus arogante eldevigadi. La rezultato estis, ke Štefánik estis ĉiam kovrita per mistera vualo kaj ke li fariĝis preskaŭ ĉiopova. Ĉio estis por li malfermita, la tuta aparato de la kolonia administrado estis ĉiam por lia libervola dispono. Li tiam ne estis franca civitano, kvankam li estis en servoj de Francujo; sed tio, kion oni ofte rifuzis al franca civitano estis atingebla por li se li nur volis. Franca kanonboato veturigis lin kiel gaston dum kelkaj monatoj sur la vasta Pacifiko, sur Markezojn, inter atolojn, ĝis al malproksimaj insuloj Rapa kaj Tabuai. Kaj iam li montris al mi le dekreton propramane subskribitan de prezidanto Fallières, donantan al li ĉiujn rajtojn de franca civitano kaj lasantan al li lian originan civitanekon kondiĉe, ke dum du jaroj li decidiĝos ĉu li volas fariĝi naturalizita Franco. Kaj por Štefánik estis tiu ĉi paŝo malfacila: tiam ankoraŭ li revis iri al la universitato de Praha kaj elkonstrui en Bohemujo plej belan steloobservejon de la mondo. Li jam havis promesitan finacian helpon de Carnegie kaj de aliaj milionuloj. Li havis jam multajn rarajn aparatojn prizorgitajn aŭ certigitajn. Kaj kiu scias, ĉu ne restis en lia koro iom da maldolĉeco pro la posta trompiĝo de tiuj esperoj kaj ĉu tiuj sentoj ne kaŭzis decidon eviti la urbon Praha dum lia unua alveno sur la teron de la respubliko, kiun li helpis konstrui sur la ruinoj de Aŭstrio-Hungarujo.

Estis mirinde kiel nekompreneblan instinkton havis Štefánik en multaj aferoj. En la distrikto de Panuvia li trovis porkan manĝujon faritan el lignogravuraĵoj de Gaugaine. En la densaĵo sur Tubuai-insulo li trovis kuriozajn idolojn el ŝtono. En Paumotu eĉ aliloke li kolektis valorajn perlojn kaj liaj konoj en tiu ĉi fako estis tiel grandaj, ke perlovendistoj venadis al li por konsilo. Inter Markezoj li malkovris neŝtatan kaj dezertan insuleton, kies ŝtonoj estis kupra mino kaj diversloke preskaŭ pura kupro.

Ankoraŭ pli strange estis, ke li senpene sciiis submeti al si la homojn. Indigenoj lin preskaŭ adoris. Li decidiĝis instrui iliajn ĉefojn sur Tahiti pri meteorologia observado; ĉirkaŭ la tuta insulo li lasis konstrui pluvo-mezurilojn kaj estis vere komike rigardi dum ĉirkaŭveturo de la insulo la malesperantaj kaj duonnudajn indigenojn starantajn apud la pluviometroj noti la statistikajn datojn. Ne unu ĉefo de Tahiti petis de mi kaj de mia edzino helpon dum niaj ekskursoj. »La nub-

*) ĉefurbo de Tahiti.

etoj super ni: mi petas, ĉu estas cumulus, stratus aŭ cirrus?»

»Homo rigardanta la stelojn« estis la nomo de Štefánik ĉe Tahitianoj; kaj tiu ĉi nomo pligrandigadis la superstiĉan estimon, kium multaj indiĝenoj sentis al li. Štefánik sciis ja, se li volis, ensorĉigi en la misterojn de l'universo eĉ la francajn oficistojn. Mi bone memoras unu vesperon, kiam kelkaj el ni sidis en Papeete sur verando, ĉiuj Francoj krom ni tri. La parolo estis enuiga kaj senenhava, ni tri estis silentaj. Subite Štefánik montris iun stelon kaj komencis priskribi iun strangan dramon kosman. La detalojn mi ne plu memoras, sed ĝis nun estas en mia parkero tiu sorĉaĵo al kiu ni submetiĝis tiom, ke fine ni eĉ ne spiras. Por kvaronhoro ni forlasis ĉi tiun planedon kaj flugis tra la universo.

Sed kvankam Štefánik sciis subigi kaj al laboro ligi aliajn, li mem ne evitadis eĉ laboron plej penigan kaj plej lacigan. Sciante, ke sen lia kunlaboro la observejo ne estus preta ĝis la kritika tago, dum semajnoj li penlaboris kune kun la indiĝenoj tiom, ke post la kritika tago de preteriro de Halleya kometo li dangere malsaniĝis. Ĉe sia malforta konstruado li troviĝis en vivdangero. Sed tio ĉe Štefánik neniam signifis ion. Laclega, ŝvitkovrita senvestiĝi kaj kuŝiĝi en montaran rivereton sufiĉe malvarman kaj resti tie dum tuta posttagmezo en veneniga ombro de ĝunglo: tio estis amuzo por li. Sed samtempe li sciis riproĉi min, ke mi paŝas en sunbrulo sen tropika kasko kaj mian edzinon, ke ŝi tion al mi permesas...

Forlasita, de tropika pluvo kaj ventoj certe difektita observejo de Štefánik orfe altiĝas hodiaŭ sub la tropika ĉielo, super urbeto kaŝita en meridiana verdeco kaj en bonodoraj floroj. Li volis reveni en ĝin post kiam li estus fininta sian grandan verkon en la patrujo; li volis reveni al la scienco, kiun li forlasis pro devo pli alta: sur Tahiti li volis fine trovi ripozon kaj trankvilon por sia turmentita korpo... La sorto decidis alie. La lastan ripozon li trovis sur sia maskiĝtero, kies unua ektuŝo estis por li kiso de la morto.

ooo

Dr. K. Domin:

LA MAMUTAJ ARBOJ.

En la suda Kalifornio, sur montaraj deklivoj de Sierra Nevada, en supermara alteco de 2000 ĝis 3000 metroj kreskas la plej grandiozaj gigantoj el la regno de kreskaĵoj, grandegaj koniferoj, kiuj plenrajte havas la fieran nomon »mamutaj arboj«. Kiel sensignifa ŝajnas la homo sub la maturaj grandeguloj, kies kolosaj trunkoj leviĝas kvazaŭ grandiozaj kolonoj al

la ĉielo! Tutaj epokoj forpasis, nacioj starintaj sur nivelo de kulturo kaj de evoluo pereis pli frue, antaŭ ol maturiĝis la plej maljunaj el tiuj grandeguloj, kontraŭ kies senmezura grandiozececo estas eĉ la »sinjoro de la naturo«, la homo, sensignifa Liliputano.

La botanika nomo de tiuj memorindaj gigantoj estas Sequoia gigantea, kaj la familia nomo estas determinita de samsignifa nomo indiana por ĉi tiuj koniferoj.

La junaj mamutaj arboj havas densan piramidiforman kronon, kiu malleviĝas preskaŭ al la tero, kaj ili estas ne malofte ornamo de parkoj kaj de ĝardenoj en pli varma parto de Eŭropo kaj en la landoj kun apudmara klimato, kiel ekzemple en la suda Anglujo, kie ili estas kulturataj kun favoro. La maljunaj arbaraj gigantoj, silentemaj memorantoj de tuta homa kulturo, havas tamen tute alian aspekton, tute diferencon de niaj koniferoj, al kiuj klasiĝas la arboj mamutaj. Majeste altiĝas iliaj gigantaj trunkoj, ili kreskas rektaj kaj senbranĉaj ofte ĝis 70 metra alteco kaj nur poste ili pertas maldensan kaj mallarĝan, neregulan kronon atingantan admirindan altecon 120 m aŭ ankoraŭ pli.

Kiam la unuaj sciigoj pri tiuj gigantoj penetris al la oreloj de civilizita mondo, neniu kredis ilin. Oni ne povas miri, ke orministoj, kiuj malkovris ilin dum siaj esploraj vojaĝoj al la flava metalo, antaŭ kiu kliniĝas la tuta mondo, akiris por siaj veraj raporto pri tiuj nekonataj gigantoj nur mokon.

La trunkoj de mamutaj arboj distingiĝas per sia neordinare potenca, laŭlonge profunde sulkita ŝelo de bele ciname ruĝa koloro. La tavolo de tiu ĉi ŝelo estas ordinare duonmetron dika kaj tial ĝi donas efikan ŝirmilon al la propra trunko. La pli granda parto de tiuj grandeguloj pro tiu kaŭzo ne estis difektita dum ripetataj arbaraj brulegoj, kiujn siatempe Indianoj tie ĉi fondadis. Nur la junaj arbetoj povis suferi, eventuale eĉ pereigi pro pereiga efiko de tiuj brulegoj, intence fondataj de indiĝenoj. Per tio ni ankaŭ povas al ni klarigi, ke siatempe apud la pramalnovaj arboj ne ekzistis plenkreskaj arboj mamutaj. Ĝenerale oni elparolis zorgon, ke tiuj memorindaj gigantoj, kies aĝo superas la daŭron de tutaj nacioj, estas la lastaj de tiu speco kaj ke kun ĉi tiuj mohikanoj por ĉiam mortos unu el la plej strangaj produktoj de

la naturo. Sed kiel sekvas el la plej nova raporto de Dro. G. Karsten, prof. de botaniko ĉe la universitato en Halle, kiu vizitis ĉi tiujn mondfamajn mamutajn arbojn en la j. 1910, ekzistas jam sufiĉe da junaj, plenkreskaj arboj. Ĉar la junaj arbaroj mamutaj estis deklaritaj kiel ŝtata rezervaĵo, oni ne bezonas timi, ke tiu ĉi arbo formortos. Sed estas certe, ke inter la junaj arboj kaj gigantaj »maljunuloj« mankas meza generacio. Sed tiu ĉi estis versimile ekstermita per la arbaraj brulegoj.

La aĝo de tiuj gigantoj estis laŭ la preciza mezurado de ĵarcirkloj fiksita je 1100 ĝis 2400 jaroj, sed estas sendube, ke rigardante al ilia dikeco, multaj arboj estas multe pli aĝaj, plej malmulte almenaŭ 3000 jaraĵoj. Ĝis je kvin eĉ ses miljaroj estis taksita la aĝo de kelkaj el tiuj grandeguloj, sed tiuj nombroj ne estas sufiĉe garantiataj. Estis mezuritaj arboj, kiuj ĉe ok m. diametro atingis la altecon da 120 m., sed ekzistas tie ĉi kelkaj (laŭ diversaj sciigoj) havantaj dimensiojn ankoraŭ pli grandajn. Oni do ne povas miri, ke en la kavaĵon de la trunko de unu falinta grandegulo (nomita »maneĝo«) oni povas komode enrajdi ĝis 24 m.

Multaj arboj havas siajn nomojn. Ekzemple estas tie ĉi la famaj »tri graciaĵoj«, kies bela bildo estas jam en la verko de Eduard Muelck »Die Riesen der Pflanzenwelt« el la jaro 1863, aliaj estas »maljuna virgulino«, »maljuna virgulo«, »koro el marmoro«, »naĵingalo«, »profesoro Gray«, »Dr. Torrey« kaj ĉefe la potenca giganto, nomata »grizzly giant«, kies aĝon oni taksas je 4000 jaroj kaj kiu estas 224 futoj alta kun amplekso 104 futoj. La botanikisto Loob, angla vojaĝisto, malkovris la mamutajn arbojn jam en j. 1850. Ĝi estis sporada arbaro de proksimume 90 arboj, kiuj kreskis en erimetro unumejla en proksimuma supermara alteco 1500 m. Tiu ĉi aro da arboj, kies meza alteco estis preskaŭ 100 m, estis nomita mamuta arbaro. En ĝi distingigis t. n. »familia grupo« da 26 arboj, el kiuj unu estis nomita »patro«, alia »patrino« kaj la restantaj »infanoj«. Sed la »patro« estas nun jam de longe elradikita. Laŭ la raportoj de Douglas ĝi estis 144 m. alta, ĝi ampleksis 35 m. kaj la dikeco de la ŝelo estis 58 cm. La ligno de tiu kolosa arbo havus laŭ proksimuma taksigo valoron da 15.000 fr. La elradikita trunko efikas ankoraŭ nun per

potenca impresio. Sed ĝi estas jam multe elputrinta kaj en ĝia kavaĵo povas la iranto promeni ĝis 57 m. profundeco kaj poste ĝi povas elrampi tra la truo post elfalinta nodo. Ĉe la admirindaj dimensioj de la mamutaj arboj oni ne povas miri, ke tra la trunko de vivanta koloso oni povas fari trairon por veturiloj aŭ eĉ loĝejon por tutaj familioj, ne danĝerigante ĝian vivon.

oooo

POR KURSANOJ.

La horloĝo.

(Akuzativo, —as, prepozicio »je«, —on.)

La murhorloĝo estas pli granda ol la poŝhorloĝo. La unua pendas sur la muro kaj la alian ni portas en la poŝo. La murhorloĝo estas el ligno, el bronzo aŭ el fero. La poŝhorloĝo estas el oro, arĝento aŭ nikelo. Ambaŭ montras kioma horo estas. Unu horo konsistas el sesdek minutoj kaj unu minuto enhavas sesdek sekundojn. Dudek kvar horoj formas unu tagon. En nia klaso ne estas horloĝo. Mia poŝhorloĝo funkcias tre precize, ĝi ne antaŭiras kaj ĝi ne postiras. Rigardu mian horloĝon (je mia horloĝo): ĝi havas tri montrilojn. La plej malgranda montrilo, kiu sin turnas tre rapide, montras la sekundojn. La pli granda montrilo montras la horojn kaj la plej granda montras la minutojn. Nun estas duono de la deka (duono post la naŭa) horo. Post dekkvin minutoj estos tri kvaronoj de la deka (unu kvarono antaŭ la deka) horo. Nia leciono komencas je la naŭa kaj finas je la deka. Ĝi daŭras unu horon.

La jaro.

(Akuzativo povas anstataŭi prepozicion.)

Tri cent sesdek kvin tagoj formas unu jaron. La jaro estas ankaŭ dividita je dekdu monatoj aŭ kvindek du semajnoj. Unu semajno konsistas el sep tagoj, kies nomoj estas: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Dum ses tagoj (ses tagojn, en ses tagoj) de la semajno ni laboras, sed dimanĉe (dimanĉon, en dimanĉo) ni ripozas. Dimanĉo estas la tago de ripozo. La nomoj de la monatoj estas: januaro, februaro, marto, aprilo, majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro kaj decembro. Kelkaj monatoj havas tridek tagojn, kelkaj havas tridek unu, sed februaro havas dudek ok tagojn. Ĉiun kvaran jaron (en ĉiu kvara jaro) februaro havas dudek naŭ tagojn kaj tiu jaro estas superjaro. En unu jaro estas kvar sezonoj: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. Marto, aprilo kaj majo estas en printempo, junio, julio kaj aŭgusto apartenas al somero, septembro, oktobro kaj novembro estas aŭtunaj monatoj kaj decembro, januaro kaj februaro estas la monatoj de malvarma vintro. Ĉu vi povas al mi diri, kiu sezono nun estas? Nun estas aŭtuno, kiu daŭras ĝis dudek dua decembro. Poste venos vintro. Se ni volas scii kiun daton ni havas aŭ kiu tago de la monato estas, ni rigardas la kalendarion (en la kalendarion). Hodiaŭ estas dudek tria oktobro.

La tago kaj la nokto.

(Kiam? Adverbo tempa.)

Dudek kvar horoj havas du partojn: la tagon kaj la nokton. Dum la tago (en la tago) ni povas vidi bone, ĉar estas lumo, sed vespere, se ni volas vidi bone, ni devas ekbruligi lampon. En nia klaso brulas gaso, tial ni povas vespere (dum vespero) lerni tie ĉi. La lumo de la gaso ne estas tro forta, tial grandaj haloj estas lumigataj de la lumo elektra, kiu estas pli agrabla. La taglumo (taga lumo) venas de la suno, kiu estas sur la ĉielo. Dum la nokto (nokte) la suno ne estas videbla, ni ne povas ĝin vidi, sed se la ĉielo estas klara, ni povas vidi la stelojn (astrojn) kaj la lunon. La steloj estas tiel multaj, ke ni ne povas ilin kalkuli (nombri). La komenco de la tago estas nomata mateno kaj la finon de la tago ni nomas vespero. Matene (dum mateno) la suno leviĝas (eliras) kaj vespere ĝi subiras. La loko, kie la suno leviĝas estas nomata oriento kaj la loko, kie ĝi subiras estas okcidento. Tagmeze (dum tagmezo) la suno estas sude de ni. La loko kontraŭ sudo estas nordo. Oriento, okcidento, sudo kaj nordo estas monddirektoj. Somere (dum somero) la suno leviĝas tre frue, je la tri aŭ kvara horo, kaj la tagoj tiam estas tre longaj. Sed vintre (dum vintro) la suno leviĝas tre malfrue kaj la tagoj estas mallongaj. Dum la tago (tage) ni laboras kaj dum nokto (nokte) ni dormas en la lito. Matene ni leviĝas kaj matenmanĝas.

Hieraŭ.

(—is.)

Hieraŭ mi ne povis veni al vi, ĉar mi estis tre okupata. La leterportisto alportis al mi multe da leteroj. Mi matenmanĝis kelke da minutoj kaj poste mi komencis mian laboron. Mi legis la leterojn kaj skribis la respondojn. Je la deka horo alvenis mia instruisto de Esperanto kaj alportis novan lernolibron. Mi legis en ĝi kelke da paĝoj, poste la instruisto prezentis al mi multe da demandoj, kiujn mi respondis sufiĉe bone. Li korektis mian prononcadon kaj donis al mi taskon por proksima leciono kaj foriris. Posttagmeze alvenis mia kuzo kun onklo, kiuj invitis min promeni en proksima parko. Sed komencis pluvigi kaj mi devis resti en mia ĉambro. La pluvo daŭris du horojn kaj tial ĝi freŝigis la naturon post longedaŭra seka vetero.

Morgaŭ.

(—os.)

Morgaŭ komencos mia libertempo. Kiel feliĉe mi vivos dum tiu tempo! Mi forveturos el nia urbo, kiu estas ĉiam plena de polvo kaj de fumo kaj mi pasigos agrablajn momentojn ĉe mia onklo en kamparo. Mi forveturos morgaŭ matene kaj antaŭ la tagmezo mi estos jam en la domo de mia onklo, terkulturisto. Mia kuzo promesis al mi, ke li atendos min en la stacidomo. Se estos bela vetero, ni banos posttagmeze en la rivero, kiu fluas proksime de la ĝardeno, kiu apartenas al mia onklo.

La tri deziroj.

(—us, por —i, lke —u.)

En unu vintra vespero sidis malriĉa laboristo kaj lia edzino en sia ĉambro kaj parolis pri la najbaro, kiu estis homo tre riĉa. »Se mi havus nom da mono« — diris la laboristo — »mi

aĉetus komercejon kaj laborus diligente por esti baldaŭ riĉa.« »Mi ne estus kontenta kun malmulte da mono« — respondis la edzino — »mi volus havi grandan domon kaj tiam, se mi vidus malriĉulon, mi penus helpi al li, por fari lin feliĉa. Sed kial paroli pri tio. Ni jam ne vivas en tempo de feinoj. Se ili ankoraŭ ekzistus, mi volus renkonti unu el ili kaj se ŝi promesus plenumi mian deziron, mi ne estus longe en embaraso, kion deziri.« Apenaŭ ŝi eldiris tiujn vortojn, aperis en ilia ĉambro bela virino, ku diris, ke ŝi estas la feino kaj volas plenumi iliajn tri dezirojn. »Sed elektu zorge, por esti kontentaj« — ŝi diris — »mi scius kion postuli. Ankoraŭ mi deziras nenion, sed al mi ŝajnas, ke mi estus perfekte feliĉa, se mi estus bela, riĉa kaj saĝa.« »Sed« — respondis la edzo — »tiam ni povus esti malsanaj aŭ morti baldaŭ. Estus pli bone deziri sanon, ĝojon kaj longan vivon.« »Sed kian utilon havus por ni longa vivo, se ni estus malriĉaj, ĝi nur longigus nian mizeron.« »Efektive, la feino povus plenumi al ni almenaŭ dek dezirojn, por kontentigi nin« — opiniis la edzino. »Tio estas vero« — diris al edzo — »sed ni havas sufiĉe da tempo por pripensi. Morgaŭ ni vidos, kiujn tri aferojn ni bezonas plej multe.« »Mi pensos pri tio tutan nokton« — diris la edzino — »nun ni varmiĝu, ĉar estas malvarme!« Ŝi iris al la forno kaj metis en ĝin kelkajn pecojn da ligno. Kiam ŝi vidis la fajron gaje bruli, ŝi diris senpripense: »Nun mi volus havi kolbason longan kiel mia brako.« — Apenaŭ ŝi finis tiun frazon, kolbaso longa unu metrôn kuŝis sur la tablo. »Sed tio estas bela deziro« — ekkriis la edzo kolere. »Nun ni havas sole du dezirojn, malsaĝulino! Nun la kolbaso alkresku al via nazo!« La edzo tuj vidis, ke li estis tiel malsaĝa, kiel lia edzino: La kolbaso saltis sur la nazon de lia edzino kaj haltis tiel bone, ke ŝi ne povis ĝin deŝiri. »Malbonulo, mizerulo, kion vi faris al mi!« — kriis la malfeliĉa virino — »vi estas plej malbona homo sur la tero!« »Mia kara« — respondis la edzo kaj penis ŝin konsoli — restas ankoraŭ unu deziro al ni, do mi deziras multe da mono kaj tiam mi mendos oran ujon por via nazo.« »Mi mortigos min pli volonte, ol mi vivus kun tia nazo« — deklaris la edzino, ŝi kuris tuj al la fenestro kaj malfermis ĝin. — »Mi volas, ke vi lasu la deziron al mi, aŭ mi elsaltos!« »Haltu!« — ekkriis la edzo — »deziru, kion vi volas!« »Mi deziras, ke la kolbaso forfalu de mia nazo!« — kaj jen: la kolbaso kuŝis sur la planko. Tiam la virino diris al sia edzo ĝoje: »Mia kara, la feino donis al ni bonan lecionon. Kредu a lmi, ke estas pli bone deziri nenion kaj esti kontenta kun tio, kion ni havas! Nun ni manĝu la kolbason, kiu sola restis al ni el niaj tri deziroj!«

La ŝtelisto.

(—ant-, —int-.)

Unu vidvino havis malgrandan domon kaj loĝis tie kun kelkaj studentoj. Unu ŝtelisto, sciante, ke la pordo de tiu domo estas ĉiam malfermita, iris tien, volante ion ŝteli. Enirinte sekrete en la ĉambro, kie loĝis studentoj, li prenis du mantelojn tie kuŝantajn sur la lito kaj volis foriri. Paŝante tra la koridoro, li

renkontis unu studenton, kiu ankaŭ estis vestita per mantelo. Vidante fremdan homon, li demandis lin, kien li portas la mantelojn. La ŝtelisto, ne perdinte spiritĉeston, respondis: »Mi volas ilin purigi!« »Tiam estu tiel afabla kaj purigu ankaŭ la mian« — diris la studento, sen vestigante sin. La ŝtelisto prenis la trian surtuton kaj ĝojante pro neatendita sukceso de sia entrepreno, li ĝoje foriris.

Matenmanĝo de Napoleono.

(—at-, —it—.)

Imperiestro Napoleono I. amis promeni tra Parizo inkognito, laŭ la maniero de Harun al Raŝid. Dum siaj ekskursoj tra la urbo li estis ordinare vestita en griza redingoto entute butonumita kaj sur la kapo li havis larĝan ĉapelon. En tiu vesto li restis tute nekonsolata al la popolo. Iam li iris sola, iam li estis akompanata de marŝalo Duroc. Dezirante vidi la staton de laboroj en la kolonio Vendom, li eliris unu matenon el sia palaco, estante akompanata de la marŝalo Duroc. Ili trairis la »ĝardenon des Tuilleries«, sekvis la straton de Rivoli, trapaŝis la straton »Castiglione« kaj venis sur la placon Vendom dum krepusko. Napoleono ekzamenis la gigantitan trabaron de la konstruaĵo. Ili restis tie dum tuta horo kaj poste ili komencis sian revenon. Ili trairis larĝan straton de Napoleono (nuntempe la straton de la Paco) kaj poste turninte sin dekstre, ili surpaŝis la bulvardon. Ili venis al la »Ĉina banejo«, kies dekstra parto estis okupita de restoracio, kiu estis ordinare vizitata de riĉaj homoj. Vidante la restoracion, Napoleono turnis sin al Duroc: »Ni eniru, tiu ĉi promeno faris min malsata«. Enirinte en la restoracion, ili sidigis al unu el la tabloj. Napoleono alvokis kelneron kaj ordonis alporti omeleton kaj botelon da vino. Ambaŭ sinjoroj manĝis kun vera apetito. La matinmanĝo estis finita per taso da kafo, kiun la imperiestro trovis pli bongusta ol tiu, kiu estis alidonata en lia palaco. Post la matinmanĝo Napoleono faris signon al la kelnero kaj diris al la marŝalo: »Pagu, ni iras, estas jam tempo«. Poste li sin turnis al la pordo kaj eliris. La marŝalo volis pagi, sed vane li traserĉis siajn poŝojn. Li konstatis, ke li lasis hejme sian monujon. Li estis en embaraso. La kelnero atendis la pagon de la fakturo, kiu montris sumon de dekdu frankoj. Fine la marŝalo decidiĝis: Li alvokis la mastrinon kaj diris al ŝi honteme: »Pardonu sinjorino, mia amiko kaj mi matinmanĝis tie ĉi, sed nun ni konstatis ke ni forgesis hejme la monon. Sed la mono estos alviŝendita post unu horo. Ni estas oficiroj de la imperiestra gardio.« »Sed mi ne konas vin, sinjoro« — respondis la mastrino — »kaj jam kelkfoje mi estis trompita per la sama maniero. La oficiroj de la imperiestra gardio estas bonaj friponoj!« La kelnero, kiu aŭskultis tiun neĝentilan parolon, interrompis ĝin dirante: »Sinjorino, ĉar tiuj sinjoroj forgesis la monujon hejme mi mem pagos por ili. Mi esperas, ke ili ne trompos malriĉan kelneron. Jen estas dekdu frankoj!« »Laŭ via volo« — respondis la mastrino kaj akceptis la monon. Kiam Duroc rakontis tiun aventuron al la imperiestro, tiu ĉi ridis kore. Posttagmeze aperis en la kafejo de »Ĉina banejo« imperiestra oficiro, kiu diris al la mastrino: »Ĉu tie ĉi hodiaŭ matinmanĝis du sinjoroj, kiuj ne pagis, ĉar ili forgesis hejme sian monujon?« »Jes, sinjoro.« —

respondis la mastrino. »Tio estis lia imperiestra moŝto kaj lia marŝalo Duroc!« La mastrino post tiuj vortoj paliĝis. La oficiro turnate sin al la kelnero, donis al li mil frankojn kiel rekompenco por lia helpo. Kelkajn tagojn poste li ricevis okupon en la palaco.

La disciplo de Murillo.

(Ekzercoj.)

Murillo, la eminenta hispana pentristo, trovis de ju tempo inter la desegnaĵoj de siaj lernantoj skizojn, kiuj montris grandan talenton de sia aŭtoro. Ili estis farataj dum la nokto kaj la Majstro ne sciis al kiu ilin atribui. Kiam unu matenon li eniris en la atelieron, li vidis la lernantojn grupigitajn ĉirkaŭ unu bildo kaj li mem ne povis deteni sian admiron, vidante portreton de bela juna virino. Li demandis unu lernanton post la alia, ĉu li pentris la bildon. Sed kiel antaŭe neniu deklaris sin kiel aŭtoro de la bildo. Tiam la Majstro alvokis sian sklavon, kiu alproksimiĝis iom tremante, kaj diris al li: »Sebastien, kiu venas ĉi tien dum la nokto?« »Neniu, krom mi« — estis la respondo. »Gardu bone tie ĉi« — daŭrigis la Majstro — »ĉar se vi ne povos morgaŭ al mi diri, kiu pentras tie ĉi dum la nokto, vi ricevos dudek batojn per bastono!« — La morgaŭon, puŝitaj de scivolemo, Murillo kaj liaj lernantoj penetris en la atelieron multe pli frue ol kutime. Kun granda surprizo ili trovis la sklavon pentrantan kapon de maljunulo. »Kiu estas via maŝtro?« — demandis Murillo la paliĝintan sklavon. »Vi mem, sinjoro!« — »Sed mi neniam al vi donis lecionon.« — »Sed vi instruis ĉi tiujn sinjorojn kaj mi aŭskultis.« — Murillo turnis sin al siaj lernantoj kaj demandis: »Kion li meritas, infanoj?« — »Liberecon, liberecon!« — vokis la lernantoj. »Ne por mi, sed por mia patro, sinjoro« — petis Sebastien. »Mi vidas, ke vi havas ne nur talenton, sed ankaŭ bonan koron. De nun vi ne estas mia sklavoj, sed mia filo. Kia feliĉo por mi, doni al la mondo tian artiston!« — tion diris Murillo kaj premis la sklavon al sia brusto.

Sambo.

En la mezo de la pasinta centjaro la anglaj militŝipoj partoprenis aktive en la subpremado de la sklaveco. En Anglujo estis eldonita leĝo, ke la sklavoj, kiu tuŝis anglan teritorion, estas libera kaj neniu plu havas la rajton denove lin sklavigi. Kaj jen okazis interesa historio: En sudamerikan havenon venis angla militŝipo kaj kelkaj maristoj en boato tuj alnaĝis al la bordo. Unu nigrulo, proksime laboranta, alkuris per rapidaj paŝoj, ensaltis en la boaton kaj kovris sin per angla flago, kiu kuŝis en la boato. Sed lia mastro ensaltis post li en la boaton kaj forkondukis lin, kvankam la maristoj protestis. Kiam la ŝipestro sciigis pri tiu ĉi afero, li tuj iris al la gubernero de la kolonio kaj postulis liberigon de la sklavoj. La gubernero respondis, ke anglaj maristoj havas nenion por ordoni al li. Tiam la ŝipestro diris: »En la nomo de ŝia moŝto angla imperiestrino mi postulas liberigon de la sklavoj! Se post duonhoro la sklavoj ne estos sur mia ŝipo, mi ordonos pafi sur vian palacon! Adiaŭ, sinjoro.« — Jam post kvin minutoj la gubernero vidis, ke la kanonoj de la ŝipo estas turnataj kontraŭ la palacon... Ne forpasis duonhoro kaj Sambo, la sklavoj, estis kondukita al la ŝipestro kiu akceptis lin en servojn de l' imperiestrino.

La juĝo.

Unu komercisto en Konstantinoplo perdis monujon, kiu enhavis du mil piastrojn. Li komisiis la urban kriiston anonci la perdon en la stratoj kaj atentigi, ke la trovinto ricevos rekompence duonon de la enhavo. La monujon trovis malriĉa laboristo, akvoportisto, kaj ĉar li estis honesta homo, li iris al la komercisto kaj redonis al li la trovaĵon. La komercisto ekĝojis, vidante la perdaĵon, sed la penso, ke li devas doni la duonon de la mono al la trovinto, forte lin ĉagrenis. Li nombris la monon kaj poste, turninte sin al la laboristo, diris: »Sed kie estas la diamanto?« La akvoportisto respondis, ke en la monujo ne estis diamanto. Tiam la komercisto diris, ke la diamanto certe estis en la monujo, sed ĝi sendube estis ŝtelita de la trovinto. Li aldonis: »Mi ne anoncos vian ŝtelon al la juĝisto, la diamanton mi donas al vi kiel rekompenco!« — La laboristo sentis sin ofendita pro la suspekto. Li iris al »kadi« (juĝisto) kaj rakontis al li la aferon. Tiu ĉi ordonis al li veni post tri tagoj. La cititan tagon alvenis la akvoportisto en la juĝejon, kie jam estis la komercisto kaj la urba kriisto. La juĝisto demandis la komerciston, kion enhavis la monujo, kiam li ĝin perdis. »Du mil piastrojn kaj unu diamanton« — estis la respondo. La juĝisto turnis sin al la kriisto: »Kion ordonis la komercisto anonci en la stratoj?« — »La perdon de monujo kun du mil piastroj« — respondis la kriisto. Kiam la juĝisto postulis de la komercisto la klarigon, tiu ĉi respondis: »Mi ne ekmemoris tuj, ke la diamanto ankaŭ estis en la monujo, sed nun mi scias tion tute certe.« — Nun la juĝisto demandis la laboriston, kion li trovis. »Monujon kun du mil piastroj.« — Tiam la juĝisto ordonis, ke la komercisto kaj la akvoportisto juru pri la vereco de siaj eldiroj. Kiam ili estis farintaj tion, la juĝisto diris: »Nun mi povas deklari mian decidon kun plena certeco, ke mi estas juĝinta bone. Vi ambaŭ estas jurintaj ĉe la nomo de la Profeto, kaj tial mi kredas, ke vi diris al mi plenan veron. Laŭ la eldiro de la akvoportisto estas klare, ke la monujo, kiun mi tenas en la mano, ne estas tiu, kiun perdis la komercisto. Tial mi konservos ĝin dum ses monatoj por la vera posedanto. Se dum tiu tempo ne estos trovita la vera posedanto, tiam laŭ la leĝo ricevos ĝin la trovinto.« Turnante sin al la komercisto, li diris: »Mi rekomendas al vi denove en la stratoj anonci vian perdon kaj ĝuste priskribi la enhavon de la monujo. Mi esperas, ke trovos sin homo tiel honesta, kiel tiu, ĉi laboristo.« — Post ses monatoj la laboristo ricevis la monujon kun 2.000 piastroj.

La kanalo de Suez.

La Suez kanalo estas certe la plej granda triumfo de la moderna tekniko. Ĝi estas efektivaĵo de plano jam tre malnova. En la kvina jarcento a. K. (antaŭ Kristo) estis la du maroj, Mediteraneo (Meza maro) kaj la Ruĝa, kunigitaj per malrekta kanala linio. Sed iom post iom la kanalo pleniĝis per sablo kaj en la oka jarcento p. K. (post Kristo) oni jam ne povis konstati, kie troviĝis la kanalo. Forpasis pli ol dek jarcentoj antaŭ ol estis farita la provo denove kunigi la du marojn kaj tiel ebligi pli proksiman vojon al la oriento. Tiu ĉi ideo ekokupis la spiriton de Bonaparto, sed la inĝenieroj tiam anoncis al li, ke inter la niveloj de Mediteranea kaj Ruĝa maroj estas diferenco da tridek futoj. En la jaro 1847 speciala komisiono

sendita de Aŭstrio, Francujo kaj Anglujo konstatis, ke la nivela alteco de ambaŭ maroj estas precize la sama, kaj en la jaro 1854 Ferdinando de Lesseps, genia Franco, ricevis permeson de la Egipta vicreĝo konstrui kanalon tra la istmo. La kanalo estis solene malfermita la 17. de novembro 1869 en solena ĉeesto de multaj gravaj personoj kaj reprezentantoj de ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj.

La unua ekvido de Ameriko.

Blovis freŝa venteto, la suno subiris. Sur la ferdeko de sia karavelo paŝis Kolumbus profundiginta en pensojn. Liaj maristoj kun ne amika aspekto observis lin. Noktaj ombroj jam de longe kovris la horizonton kaj la granda navigisto ĉiam ankoraŭ penis trapenetri la mallumon per sia akra vido. Subite ŝajnis al li, ĝi estis ĉirkaŭ la dudeka horo, ke li ekvidas lumon. Li ne kredis al siaj okuloj kaj vokas Pedron Gutierrez, la reĝan ĉamberlanon, kaj demandas, ĉu li vidas lumon. Tiu ĉi jesis. Sed ankaŭ nun Kolumbus ankoraŭ ne kredas. Li vokas Roderigon Sancheri de Segovia kaj demandas la samon. Sed nun la lumo malaperis kaj oni vidas nenion. Post nelonge la lumo denove estas videbla kaj denove ĝi malaperas. Tiel pasis la nokto, por maristoj plena de necerteco. Tamen Kolumbus fidas, ke proksime estas lando, lando loĝata. Post la dua horo matene anoncis la gardisto Rodrigo de Triano, ke li vidas landon. Kaj efektive, la lando nun estis videbla en distanco de du mejloj. La spirita intenseco de Kolumbus en tiu ĉi nokto plene elĉerpis liajn fortojn. Sed lia celo estis atingita: li klarigis la grandan misteron de la Maro. Kaj tiu ĉi lia sukceso fondis lian eternan gloron.

Monumento de la homa laboro.

Kiu ne estus aŭdinta pri la nomo de Eifel? En ĉiu okazo, kiam oni parolas pri iu speciale alta konstruaĵo, la turo de Eifel estas kvazaŭ mezurilo, kiu tamen ĉiam restas la plej kuraĝa verko de homa mano, neatingita ĝis nun koncerne sian altecon. Ĝia konstruado surprizis al mondon ne sole per io ĝis tiam ne konita, sed ankaŭ per laboro tiel rapida, ke la turo estis preta la unua el ĉiuj konstruaĵoj, kiuj por la ekspozicio pariza en la jaro 1889 estis konstruataj. Malgraŭ tio, ke multaj voĉoj, kritikintaj malfavore la projekton antaŭ ĝia efektivaĵo, vidis en tiel alta konstruaĵo malbeligon de Parizo, forgesante, ke eĉ koloseco povas efiki impresige kaj bele, tamen fariĝis la turo fokuso de la ekspozicio kaj miloj jam venis, por vidi kaj admiri la novan mirindaĵon de la mondo, por mediti sur ĝia pinto... Neniu detalaĵo estas en la tuta verko okulrapanta, ĉiuj linioj, ĉiuj arkoj plaĉas pro sia proporcio. Sur betonitaj, 12 m profundaj fundamentoj ripozas kvar fertrabaj kolonoj, kiuj en alteco de 60 m portas plataĵon en formo de galerio; tie sin trovas restoracioj, teatro kaj ronda promenejo ĉe la 300 m lateroj de la kvarangula plataĵo. Super la kvar ĉefaj kolonoj, kiuj — same kiel la egiptaj piramidoj — montras la kvar geografiajn direktojn, kuniĝas la fera maso en gracion unukolonan turon, kiun kronas en alteco de tricent metroj vitrokovrita promenejo. La tutan amason da sep milionoj da kilogramoj, kiu konsistas el ferpecoj pezaj eĉ 3000 kg., kuntenas sume du kaj duono de milionoj da vinktoj. Dum du jaroj laboris 40 desegnantoj super la bezonaj 15 mil planoj. Sur la turo, kiun oni povas piede

aŭ per liftoj supreniri, trovas lokon je unu fojo 23.000 personoj (la plej granda vizito dum la ekspozicio). Ĉiuhore povas suprenporti la liftoj preskaŭ 2400 personojn. La vizito de tiu ĉi koloso estas tre rekomendinda al ĉiu, kiu volas havi ideon pri la grandiozeco de Parizo, ĉar la galeriaj promenejoj en la unua kaj precipe tiu de la tria etaĝo estas ĉe klara vetero la plej ofte elserĉataj observejoj, ebligante vidi la urbon ĝis la ekstrema, en nubo perdiĝanta periferio. Kiel bela reliefa plano etendiĝas sub la rigardanto la panoramo de la metropolo, kiun trairas kiel arĝenta rubando la rivero Seine. Oni suprenveturu al la dua kaj tria etaĝoj: la feraj traboj estas videble pli kaj pli malpezaj, sub niaj piedoj estas la zinkaj tegmentoj de al restoracioj kaj galerioj unuetaĝaj. Veninte en la duan, oni ne plu pensas pri la impresoj ĝuitaj en la unua etaĝo. Ekokupas nin refoje la nenie ankoraŭ vidita panoramo de la urbejo. La dolĉe moviĝanta veturo de la vagono certigas nin pri fortiĝo de la konstruaĵoj kaj forprenas de ni ĉiun timon. La plej alta etaĝo, kiu estas duobligita per nekovrita galerio, estas tiu loko, kie oni mirante kaj meditante pasigus pli ol unu horon, ĉirkaŭpaŝante de unu fenestro al la alia. Kelke da lastaj ŝtupoj alkondukas nin al la plej alta pinto de la urbo — elkonstruita per homa mano — al la eksloĝejo de Eifel, kie nun estas fiksitaj meteorologiaj aparatoj. Plej alte flirtas la trikolora flago, metanta simbolo sur la plej altan lokon la mirindan arton de la francaj inĝenieroj. La turo estas ankaŭ unu el la plej gravaj konstruaĵoj por Francujo pro siaj praktikaj aranĝoj: havante perfekte establitajn stacion por senfadena telegrafio, ĝi estas laŭ la strategia vidpunkto la ĉefa stacio por transsendado de militaj ordonoj kaj signaloj al marŝipoj, ĉar la spaco, kien la elektraj ondoj estas komunikeblaj, ampleksas kvar ĝis kvin mil kilometrojn. Surportante krom diversaj aparatoj por observoj meteorologiaj potencajn reflektorojn, la turo estas samtempe taŭga stacio por orientiĝo.

Falĉilo kontraŭ ŝtono.

Dum la olimpiaj ludoj en Stockholm venis iu sinjoro en restoracion, demetis la superveston, starigis la pluvombreton apud la pendhokaron kaj fiksis sur ĝin folieton kun la sekvanta noto: Tiu, al kiu ĝi apartenas, estas monda ĉampiono de bokso kaj li revenos tuj. Post kiam li estis vespermanĝinta kaj volis foriri, estis la pluvombrelo for kaj sur ĝia loko estis fiksitaj la suprenomita bileto kun sekvanta noto dorsflanke: Tiu, kiu nun havas la pluvombreton, estas maratona kuristo kaj revenos neniam plu.

Stranga malkompreno.

Unu riĉa fremdulo, nomata Suderland, estis bankisto de la reĝa kortego kaj li ĝuis sufiĉe grandan favoron de la imperiestrino Katarino II.

Unu matenon oni anocis al li, ke lia domo estas ĉirkaŭita de soldatoj kaj ke iu polica oficisto volas paroli kun li. Tiu ĉi oficiro, nomata Reliev, eniris kun mieno konsternita. — »Sinjoro Suderland« — li diris — »mi devas plenumi unu ordonon de mia amata imperiestrino, kies krueleco min timigas, malĝojigas. Mi ne scias per kiu ago aŭ per kiu krimo vi kolerigis la imperiestrino ĝis tiu ĉi grado.«

»Mi ankaŭ ne scias« — respondis la bankisto — »kaj mia surprizo superas la vian. Sed diru fine, kiun ordonon vi havas!« »Sinjoro« — respondis la oficisto — »efektive mankas al mi la kuraĝo por anonci ĝin al vi!« »Ho, kio! Ĉu mi eble perdis la konfidon de ŝia Moŝto?« »Se estus nur tio, vi ne vidus min tiel ĉagrenitan. La konfido povas reveni.« »Ĉu ŝi ordonis ekzili min?« »Ĝi estus malagrabla, sed kun via riĉeco estas bone ĉie.« »Ĉu ŝi ordonis ĵeti min en malliberejon?« »Se estus nur tio ĉi!« »Mia dio! Ĉu ŝi ordonis vipbati min?« »Tu ĉi turmento estas terura, sed ĝi ne mortigas.« »Do, kio?« — kriis la bankisto singultante — »ĉu mia vivo estas perdita? L'imperiestrino, tiu bona, tiu indulgema, kiu antaŭ du tagoj ankoraŭ tiel afable parolis al mi, ĉu ŝi volus... Sed mi ne povas kredi tion. Ho, kompaton! Diru, kion ŝi ordonis!« »Mia kara sinjoro« — diris oficisto per voĉo plorema — »mia bona imperiestrino ordonis al mi lasi vin remburi.«

»Remburi! Min remburi!« — ekkriis Suderland fikse rigardante la polican oficiston. — »Sed vi frenezigis aŭ la imperiestrino perdis prudenton. Vi ja ne povis akcepti tian ordonon ne sentante ĝian barbarecon!« »Ho, mia bedaŭrinda amiko, mi montris mian surprizon, mian doloron. Mi provis fari modestan proteston, sed mia justa imperiestrino riproĉis al mi per tono indignita mian heziton. Ŝi ordonis energie plenumi tuj sian ordonon. Ŝia voĉo ankoraŭ sonas al mi en oreloj: „Iru kaj ne forgesu, ke via devo estas senprokraste plenumi la ordonojn al vi donitajn!“

Ne estas eble priskribi la surprizon, la doloron, la malesperon de bedaŭrinda bankisto. Longe li petis la oficiston, ke li permesu al li skribi leteron al la imperiestrino por ŝin petfavorigi. Fine la oficisto, venkita de lia malespero, cedis tremante al liaj petoj. Preninte la leteron kaj ne kuraĝante iri mem al la imperiestrino, li sin turnis al la gubernero de Petrograd. Tiu ĉi kredis, ke la polica oficisto frenezigis. Li ordonis al la oficisto atendi lin en lia palaco kaj li mem senprokraste kuris al la imperiestrino. Estante akceptita de ŝi, li klarigis la kaŭzon de sia alveno.

La imperiestrino aŭskultinte liajn vortojn, ekkriis: »Bona ĉielo! Reliev perdis prudenton! Eliru, rapide, kuru kaj ordonu al tiu frenezulo tuj liberigi la bedaŭrindan bankiston!« — Subite ŝi komencis ridi. »Mi divenis la enigmon!« — ŝi ekvokis — »mia favorata hundo, kiun mi nomis Suderland, mortis. Kaj mi ordonis al Reliev lasi lin remburi. Kiam li hezitis, mi ekkoleras je li, pensante, ke li trovas la ordonon sub sia digneco.«

Blinda obeemo.

Unu soldato, staranta antaŭ la pordo de la bilda galerio, ricevis ordonon, ne permesi eniron al la viroj, kiuj ne estus demetintaj antaŭe sian bastonon. Venis unu sinjoro, havanta la manojn en siaj poŝoj. La soldato ekkriis je li: »Haltu, kie estas via bastono?« »Mi ne havas ĝin.« »Tial revenu kaj alportu ĝin, ĉar alie mi ne povas permesi al vi la eniron.«

Rekompenco.

Unu universitata studento petis sian kolegon prunti al li libron, kiun li bezonis por sia studo. La kolego, kiu ne estis tro servema, respondis, ke li permesos la uzon de la libro nur en sia

ĉambro. Kelkajn tagojn poste venis tiu ĉi homo al sia amiko kaj petis pruntedonon de la rastilo por rasti la cindron en la forno. »Mia kara knabo — respondis la amiko — »vi povas uzi mian rastilon laŭ via volo, sed mi ne povas permesi preni ĝin eksteren!«

La vojo.

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek batoj de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
»Ho, ĉesu!« mokante la homoj admonas, —
»Ne ĉesu, ne ĉesu!« en kor' al ni sonas:
»Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos.«

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigita,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝif jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo, post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro. L. L. Zamenhof.

La Panama kanalo.

La Panama kanalo, kuŝante meze inter la Norda kaj Suda Amerikoj, tranĉas la istmon larĝan tiu-loke 56 km. La kanalo, ekkonstruita de Francoj sed finkonstruita de Amerikanoj, kostis 400 milionojn da dolaroj kaj estas longa 73 km. Kvardek mil homoj laboris pri forigo de 14 milionoj da kubaj metroj da materialo; la plej gravajn malhelpaĵojn dum tiu ĉi laboro prezentis la vulkaneca, nefirma tereno kaj la danĝeriga febra malsano, kiu en tieaj marĉaj regionoj mortige furiozadis. Ĉe la kanalo elkreskis protektaj fortikaĵoj kaj nova urbo, kiun oni nomis je honoro de malkovrinto de la Pacifika Oceano »Balboa«. Simile elkreskis ĉe la Suez kanalo urbo Port Said. La ŝipoj povas nun post 10 horoj da veturo trapasi el la Atlantika Oceano en la Pacifikan, ne bezonante plu ĉirkaŭveturadi la tutan kontinenton sudamerikan.

Humorajoj.

En embaraso. Iu profesoro donis al lernanto demandon. Tiu silentas. — »Kial embarasas vin mia demando?« demandas lin la profesoro. — La lernanto respondas kuraĝe: »Ne, s-ro profesoro, la demando ne embarasas min, sed la respondo.«

∞∞∞

REVENO DE NAPOLEONO.

El franca lingvo trad. L. Riedl.

Kiam Napoleono forkuris el Elbo, li baldaŭ akiris la koron de Francio. Kiamaniere li ĝin akiris, pri tio la plej bonaj dokumentoj estas tiuj, kiuj aperis en diversaj gazetoj:

La Kanibalo forlasis sian kuŝejon.
Korsika Ĉiomangegulo estas en la golfo de Juano.

La Tigro penetris ĝis al Gapo*
La Bestio kuŝas en Grenoblo*
La Tirano trairis Lyonon*
La Uzurpulo estas nur 60 mejlojn de la ĉefurbo.

Bonaparte alproksimiĝas, sed li ne venos Parizon.

Napoleono estos morgaŭ antaŭ niaj pordegoj.

La imperiestro estas jam en Fontainebleau*.

Lia imperiestra Moŝto hieraŭ feste enveturis en Tuileries* kaj estis ĉie kore salutita de fidelaj civitanoj.

KULTURO

Memorindaj datoj en majo: La 4. m. 1919 estis per akcidento mortigita M. Steĝnik, astronomo kaj unua ĉs. ministro de nacia defendo. — La 5. m. 1821 mortis Napoleono Bonaparte. — La 7. m. 1840 nask. P. J. Ĉajkovskij, la fama komponisto. — La 8. m. 1794 estis senkapigita A. L. Lavoisier, la patro de moderna kemio. — La 9. m. 1805 mortis F. Schiller, la konata verkisto kaj poeto germana. — La 12. m. 1884 mortis B. Smetana, la fondinto de ĉeĥa muziko. — La 14. m. 1316 nask. la plej bona reĝo bohema Karlo IV., »patro de la patrujo«. — La 19. m. 1790 estis en Francujo nuligitaj la privilegioj de nobelaro. — La 21. m. 1506 mortis K. Kolumbus (itale: Cristoforo Colombo, hisp.: Cristóval Colón), la malkovrinto de Ameriko. — La 23. m. 1498 estis bruligita G. Savonarola, eklezia reformisto. — La 26. m. 1876 mortis F. Palacký, la bohema historiisto. — La 29. m. 1434 estis Konstantinoplo venkoakirita de Turkoj.

Memorindaj datoj en la monato junio: La 1. j. 1811 estis publikata la aŭstria civitana leĝaro. — La 5. j. 1783 okazis la unua provo de Mongolfier kun lia balono. — La 6. j. 1861 mortis C. Căfaur, kuniginto de Italio. — La 9. j. 1781 naskiĝis J. Steĝenson, eltrovinto de lokomotivo. — La 13. j. 1794 okazis terura eksplodo de Vesuvio. — La 15. j. 1389 okazis la batalo sur »Kampo Kosovo«. —

*) Francaj urboj; rim. de l' trad.

La 18. j. 1815 estis Napoleono venkita apud Waterloo. — La 21. j. 1621 estis en Praha ekzekutitaj 27 bohemiaj nobeloj pro ribelo kontraŭ aŭstria Ferdinando II. — La 23. j. 1633 estis G. Galilei devigita revoki sian deklaron pri turniĝo de Tero. — La 24. j. 1859 estis Aŭstrio venkita apud Solferino. — La 25. j. 1254 malvenko de Tataroj apud Olomouc. — La 29. j. 1793 maskiĝis Jos. Resl, eltrovinto de la ŝipa ŝraŭbo.

La popola Universitato de Hus en Plzeň, kiu estis fondita en la j. 1919, estas nuntempe la plej granda popola edukejo en Ĉs Resp. En la pasinta jaro ĝi estis vizitata de 5560 lernantoj, el kiuj estis 2100 virinoj. En 130 fakoj instruis 115 profesoroj. En la kursoj aranĝitaj de la universitato estas reprezentataj ĉiuj fakoj de la homa scio. Ĝi posedas propran sciencajn biografon, kiu estas specialaĵo en la ĉs. respubliko, ĉar ĝi estas alirebla ankaŭ al vasta publiko. La ĉefa subtenanto de la universitato estas samnoma societo, havanta nuntempe pli ol 2000 membrojn. La spezo en la lasta jaro prezentis 1,200.000 Kč. — De la jaro 1921 estas en la universitato ankaŭ Esp. instruata. Ĝi okazis pro celoj praktikaj, por ebligi al kandidatoj la rilaton kun eksterlandaj altaj lernejoj popolaj kaj por ke ili dum la okazantaj ekskursoj en eksterlandon havu la eblon per la internacia lingvo informiĝi pri la situacio en fremdlando. — Ĉiujn deziratajn informojn volonte donas: Kancelario de Lid. Universita Husova en Plzeň. — Prof. V. Patzák.

oooo

ĈEĤOSLOVAKIO.

Industriaj rimedoj en Ĉeĥoslovakio.

El angla originalo, sendita de s-ro Pokorný, tradukis V. Kroužil.

Dum la parolado en la Ĉeĥa Societo por la nacia ekonomio, s-o M. Dvořáček, ĉeĥa inĝeniero, faris interesan raporton pri la eksporta karaktero de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Multaj branĉoj de la ĉs. industrio dependas de eksporta komerco. Agrikulturaj eksportaĵoj konsistas el grandaj kvantoj da produktoj de l' agrikulturindustrio kiel sukero, biero, malto, alkoholo, fruktoj, legomoj, lupolo kaj hordeo. Sukero estas unu el la plej gravaj aĵoj de la ĉs. eksporta komerco. Ekzistas 120 malfarejoj postulantaj 32.000 vagonojn da hordeo kaj eksportantaj jare 8.000 vagonojn da malto. Ĉeĥoslovaka biero estas alilande bone konata; normala jarprodukto estas 13 milionoj da hektolitroj. Antaŭ la milito multaj bierfarejoj, precipe tiuj de Plzeň, eksportis duonon da sia produkto. En 1920 la produkto de lupulo atingis 120.000 kvitalojn, el kiuj 80.000 estis eksportitaj. Fabrikoj por produkto de gisto, kafoanstataŭaĵoj kaj cikorio, lakto-ajoj ktp. eksportas ankaŭ konsiderindan kvanton da produktaĵoj. Estas 80 fabrikoj por la produkto de sukeraĵoj, eksportataj 50% da siaj produktaĵoj.

Granda kvanto da brulligno, ligno kaj lignaĵoj estas haveblaj por alilandaj vendejoj. Dum jaro 1920 oni eksportis 760.000 kvitalojn da papero, valorantaj duonmiliardon da ĉs. kronoj. Ĉiuj ĉirkitaj industrioj ricevas krudmaterialojn de la enlanda produkto. La ferindustrio dependas de karbo, el kiu povas esti produktata koakso. Koakson oni ankaŭ eksportas, kaj kune kun ligno kaj torfo ĝi estas la plej granda ĉeĥoslovaka eksportaĵo (51 milionoj da kvitaloj, valorantaj 1 ĝis 1½ mili-

ardoj da ĉs. kronoj). Ekzistas 68 porcelanfabrikoj, eksportantaj 75% da siaj produktaĵoj. La vitroindustrio, okupanta 60.000 laboristojn en 200 fabrikoj, kaj ĉiu specialindustrio dependas ankaŭ de la eksportkomerco (en 1920 estis eksportitaj aĵoj, valorantaj 3 miliardojn da ĉs. kronoj). La ferfabrikoj, importantaj ĉirkaŭ duonon da krudaj materialoj el aliaj landoj, same la ŝtalfabrikoj eksportas 50 ĝis 60% da produktaĵoj. Tio sama rilatas la maŝinindustrion kaj vagonfabrikojn. La ledindustrio entenas 260 fabrikojn. La produktiveblo de la piedvestindustrio estas taksita je 60 milionoj da paroj de botoj, kiuj kompreneble ne povas esti disvenditaj hejme. Granda kvanto da teksaĵoj (kotonaj, lanaj kaj tolaj) estas eksportataj. La vestaĵindustrio eksportas du trionojn da produktaĵoj kaj duono da ĉapeloj estas vendataj en aliaj landoj.

Tial la politiko de la komercaj kontraktoj estas tre grava, ebligante regulan interŝanĝon de komercaĵoj inter Ĉeĥoslovakio, la najbaraj ŝtatoj kaj aliaj landoj. Ĉeĥoslovakio efektiviĝis komercajn kontraktojn kun preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj kaj nun preparas novan tarifon, kiu formas definitivan bazon por ĉeĥoslovaka eksportkomerco.

Monumento al Comenius. Komitato por starigi monumenton al Comenius (Komenský) publikigis konkurson por modeloj de monumento al Comenius, kiun oni konstruos en Amsterdam sur vojkruciĝo de Lairesse-Straat kaj Valerius-Plein. La premioj estas: I. 20.000 Kč, II. 16.000 Kč, III. 12.000 Kč.

La valoro de ĉeĥoslovaka krono. En Ĉeĥoslovakio oni pagas: por 100 kr. aŭstria: 0.54, por 100 germ. M.: 17.05, por 100 hol. guld.: 2060, por 100 fr. sviz.: 1007.50, por 100 fr. franc.: 479, por 1 dol. am.: 52.80, por 100 hung. kr.: 6.15, por 100 kr. pol.: 1.23 Kr. ĉs.

Cirkulado de bankbiletoj en Ĉs. Resp. estis la 15. de t. m. 9.488,436.854.50 Kč. Ĝi estis je 658,102.606 Kč pli malalta ol la leĝo permesas.

Nuligo de festotagoj. La registaro preparas leĝon, ordigantan la festotagojn en la respubliko. Oni intencas nuligi la duan festotagon en Pasko kaj en Pentekosto, la festojn de Mario, Ĉieliron de Kristo, Kristkorpan feston, Johanon de Nepomuk (festotago en Bohemio). Kiel festoj estos deklaritaj: 1. majo (festo de laboro), 6. julio (memortago de bruligo de Majstro Johano Hus) kaj 28. oktobro (festo de nacia liberigo).

DIVERSAĴOJ

Pro la ŝanĝo en la administrado kaj en la redaktado de nia gazeto ne estis eble eldoni la gazeton ĝustatempe kaj tial aperas nun duobla numero. Ni esperas, ke la nova angulo »Por kursanoj«, kiun ni komencas enpresi en tiu ĉi kajero, estos ĝoje akceptita de kursgvidantoj kaj de komencantoj, kiuj multnombre abonas nian gazeton.

Societajn raportojn, skribitajn klare kaj koncize, oni sendu antaŭ la 10. de ĉiu monato al la redakcio!

Fino de kumbatalanto. El »Sennacieca revuo« ni sciigas, ke la redaktoro de Esp. laboristo s-o E. Adam mortigis sin en monato oktobro. En sia testamento li skribis, ke oni silentu pri lia morto.

— Ni ne intencas skribi nekrologion al li, sed ni diras, ke tiu sciigo nin kortuŝis. Li trovi Pacon en la tero. — B. T.

La II. konferenco de okcidentbohemiaj esperantistoj okazis la 7. de majo en la »Popola scenejo« de Laborista domo »Peklo« en Plzeň. Preskaŭ ĉiuj grupoj de la distrikto estis reprezentataj. Estis fiksitaj ideaj limoj de la regiono. La raporton pri ĈAE kaj pri la kongreso en Brno prezentis ĝenerala sekretario de ĈAE s-o Hromada. S-o Gross en tre interesa parolado priskribis Brno, la urbon de la unua ĉeĥoslovaka kongreso esperantista kaj rekomendis multnombran viziton. Por loko de venonta konferenco oni fiksis Nýřany. — Antaŭ la konferenco (sabate la 6. majon) okazis amika festvespero aranĝita komune de Lab. ligo esp. sekcio Plzeň I. kaj de Esp. klubo. Jen kuhelpis la poŝtista muziko kun humoristoj kaj membroj de ambaŭ socioj. La »popola scenejo«, en kiu okazis tiu ĉi festo, estis kvazaŭ »ŝtopita« per homoj.

Akademia Fako pri konkursoj kaj premioj. Dum la vintro 1921—22 la Akademio ne sin okupis pri premiado, ĉar ĝi ricevis nur unu verkon por ekzameno kaj eventuala rekompenco. La kaŭzo estas sendube, ke nek aŭtoroj, nek eldonistoj sufiĉe informiĝis pri la regularo. Utile estas do ĝin denove publikigi kaj konigi al la esperantista publiko. — Por eviti senutilan elspezon al aŭtoroj kaj eldonistoj — la rekompenco estas nur honora — la sendado de la libroj estu farata jena maniere: Kun la prezento oni sendu: 1 ekzempleron al la Prezidanto de la Akademio: Prof. Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris. 1 ekzempleron al la Direktoro por konkursoj kaj premioj: D-ro Edmond Privat, 2, Chemin de Roches, Genève. — **Regularo pri verkoj rekompencotaj de la Akademio.** 1. La Akademio rekompencas ĉiujare kelkajn verkojn rimarkindajn laŭ stila rilato. 2. La nombro de la kronitaj verkoj ne superos kvin (5). 3. Oni rajtas proponi por la rekompenco tradukojn, sed originalaĵoj estos preferataj de la Akademio. 4. La prezentataj verkoj devas esti publikigitaj en la lasta jardeko. 5. Nur libroj, kia ajn estas ilia amplekso, aparte eldonitaj, sekve ne gazetaj artikoloj, nek manuskriptoj, estas prezentebaj. 6. Verkoj de akademianoj ne estas rekompenceblaj. 7. La rajto de prezentado estas rezervita al la membroj de la L. K. A., kiuj rajtas proponi ĉiu po du verkoj, kun konsento de la aŭtoroj. 8. La proponoj, montrante tre klare kaj precize la titolon de la verko, la eldonejon kaj la daton de la unua apero, devas esti sendataj al la C. Oficejo (51, rue de Clichy, Paris) antaŭ la 1. de marto. 9. Akademia komisiono elektos, post la legado de ĉiuj proponitaj verkoj, la dek plej bonajn. 10. La plena Akademio, post raporto de la komisiono, elektos la 5 rekompencotajn.

La stato de instruado de Esp. en lernejoj. Dum la geneva konferenco estis prezentitaj jenaj raportoj: En Bulgario estas esp. enkondukita fakultative per leĝo pri popola edukado. Nuntempe la instruado okazas en 25 gimnazioj kaj en kurso por gimnaziaj instruistoj. En Ĉeĥoslovakio oni instruas esp. fakultative en 15 popolaj lernejoj, 3 mezaj lernejoj kaj unu profesia lernejo. Oni sentas mankon da instruistoj. En Francujo oni oficiale ne instruas en la ŝtataj lernejoj, sole en la lernejoj de la Komerco ĉambro de Parizo. En Germanujo oni instruis lastjare

en lernejoj de 223 urboj. Depost la Pasko t. i. oni instruos en novaj 52 urboj. En Anglujo estas esp. instruata devige en 18 lernejoj. En Italujo oni instruas nedevige en 6 maristaj lernejoj. En Milano oni instruas en 54 klasoj, en Bologna en 4 klasoj, en Cremona en 10 klasoj kaj en Cologna Veneta en 1 klaso. En Nederlando ĝis nun ne ekzistas oficiala decido pri esp., sed ĝi estas instruata nedevige en 60 klasoj. En Genevo esp. estas instruata devige en la sepa grado (lernatoj 13—14 jaraj) depost sept. 1921. Entute estas 13 klasoj. En Ĉinujo estas oficialaj kursoj en la univ. de Pekino kaj en teknikaj lernejoj de 5 urboj. En Japanujo lastatempe multaj profesoroj kaj diplomatoj prezentis al la registaro la petskribon pri Esp. La decido de parlamento estis favora: ĝi konsistis la min. de instruado zorgi pri la enkonduko de esp. en lernejojn. En Hungarujo estas oficiale permesite instrui esp. dum du horoj semajne en ĉiuj mezlernejoj.

Esperanta albumo de Plzeň. Esp. klubo de Plzeň sendis al la Nacia ekspozicio en Rio de Janeiro, (aranĝota aŭtune por festi centjaran sendependecon de Brazilio) grandan albumon, enhavantan pli ol cent fotografiaĵojn de diversaj gravaj konstruaĵoj, scenoj el popola vivo, naciaj kostumoj kaj de gravaj fabrikoj de Plzeň. La albumo estis farita per helpo de Konstrua oficejo en Plzeň kaj ankaŭ la Ministerio de Eksterlandaj aferoj sendis kvar fotografiaĵojn (de prez. Masaryk, ĉefmin. Beneš kaj du panoramojn de la kastelo Hradčany). Por trarigardi la albumon la klubo invitis diversaj interesulojn. Interalie alvenis (20 majon) ankaŭ urbestro de Plzeň, parlamentano Luděk Pík kaj direktoro de la urba Fremdula oficejo J. Schiebl. Ili estis akceptitaj en speciala kunveno membra en halo de hotelo Svoboda. Bonvenante la gastojn la kluba prezidanto J. Pavlík diris, ke la klubo jam de kelkaj jaroj partoprenas la eksterlandan propagandon per eldonado de »La Progreso«, kiu enpresas artikolojn pri la respubliko. Por sia laboro la klubo neniam petis subvencion. Ankaŭ tiu ĉi albumo, kiu estos sendata ĉiujare al unu eksterlanda ekspozicio, faris la klubo per siaj propraj monrimedoj per helpo de kelkaj siaj membroj kaj de firma K. L. Soběhrad, kiu plej grandan parton de la fotografiaĵoj faris tute senpage. La urbestron la prezidanto bonvenigis kiel amikon de progrescelaj ideoj, kiu ankaŭ interesiĝas pri esperanto. Tial li povas esti certa pri amikeco de la klubo, kiu mem konsistas el diversklasaj sed progresemaj civitanoj de Plzeň. La urbestro en sia pli ol duonhora parolado esprimis sian ĝojon pro la fakto, ke en la klubo amike rilatas la homoj apartenantaj al diversaj klasoj kaj politikaj partioj, dankis al la klubo pro ĝia laboro kultura, taksis la grandan valoron de esp. laŭ ĝia lingva valoro kaj interna ideo kaj certigis la klubon per ĉiama subteno de la urbestro. Post trarigardo de la albumo sekvis amika festo, dum kiu kuhelpis ĉefe la koncertaj kantistoj f-ino Mikšiková kaj s-ro Vilim. La urbestro s-ro Pík restis en la rondo de klubanoj ĝis la fino de la festo.

Rimarkinda bonvolemo. Esp. klubo de Plzeň demandis la ministerion de poŝtoj kaj telegrafoj kial la ministerio ordonis al diversaj poŝtofiĉejoj anoki la nomojn de oficistoj parolantajn esperante. La klubo ricevis jenan respondon: »Al Via de-

mando el 29. aprilo 1922 la min. de poŝtoj kaj telegrafoj sciigas la jenon: Prezidanto de »Internacia ligo de esp. poŝtistoj« en Bamberg sendis al s-ro ministro leteron el 25. nov. 1921, en kiu li esprimis la deziron anonci al li la adresojn de poŝtistoj parolantaj esperante, aŭ esp. lernantaj. La ministerio plenumis la deziron en la letero enhavitan, lasinte esplori la scion de esp. inter la poŝtistoj de ĉs. resp. kaj sendinte al la prezidanto de »Hepo« per noto el 3. majo 1922, n-ro 22730/III la petitajn du nomarojn de la poŝtistoj. En la unua estis notitaj tiuj, kiuj esp. jam konas, en la alia la oficistoj esp-on lernantaj. Ĉe ĉiu poŝtisto estis notita lia dejora rango kaj dejora loko aŭ loĝejo. La ministerio ne protestas kontraŭ la publikigo de tiu ĉi informo en Via gazeto. El ordono de la ministro:« (subskribo nelegebla).

oooo

LABORISTA LIGO ESPERANTISTA.

(La raportojn por tiu ĉi rubriko oni sendu plej malfrue ĝis la 10. de ĉiu monato al k-do J. Pech, Plzeň, Houšková ul. 4.)

Atentigo al laboristaro en Ĉeĥoslovaka respubliko! Dimanĉe la 22an de januaro 1922 okazis ĝenerala kunveno de »Lab. asocio esp. en Plzeň«, sidejo Lab. domo »Peklo«. La kunvenon partoprenis multnombre laboristaj delegitoj el okcidenta Bohemujo. Post elekto de komitato laboristaj delegitoj proponis, ke estas nepre necese, se oni volas esti bone organizataj, ŝanĝi la nomon kaj statuton de la asocio kaj fondi »Lab. Ligon Esper.« por tuta Ĉeĥoslovaka respubliko kun sidejo en Plzeň. La propono post vigla diskuto kaj klarigo estis kun entuziasmo unuanime akceptita kaj tuj estis elektito komisiono, kiu ĉion prizorgos. Post zorge preparitaj laboroj kunvenis ĉiuj delegitoj la 19an de februaro en Lab. domo kaj elektis jenan komitaton: Prezidanto Josef Pešek, Plzeň; sekretario Josef Lukeš, Doubravka apud Plzeň; kasisto Frant. Hess, Doubravka apud Plzeň; raportisto Josef Pech, Plzeň. Ĝis nun al Ligo aliĝis Plzeň I., sidejo Lab. domo »Peklo«, kiu donacis subvencion al la Ligo 500 Kč por lab. movado; Plzeň II. (germanaj laboristoj); plue antaŭurboj Plzeň-Karlov, Letná, Doubravka (donacis 100 Kč al Ligo), Oujezd apud Plzeň, Dolní Lukavice apud Přeštice, Ledce apud Třemošná, Týmákov apud Plzenec kaj aliaj lokoj, kie ni gvidas kursojn, ankoraŭ aliĝos. Starigita Laborista Ligo jam funkcias, sed realigo de niaj intencoj dependas de laboristaro; elektita komitato bezonas kunhelpon de ĉiuj gekamaradoj, nur tiel nia laboro per reciproka helpo estos plifaciligata. Karaj gekamaradoj, kie troviĝas laborista societo, rondeto aŭ izolulo, aliĝu al Lab. Ligo, plifortigu nian movadon, ni scias, ke vi estas dissemitaj en tuta respubliko, kuniĝu, atentigu kaj klarigu ĉion al ĉiu kamarado, rekomendu nian Lab. Ligon Esp., kiu prenis sur sin ĉi-tiun malfacilan taskon, disvastigadi nian noblan ideon inter laboristaro per esperanto. Nur tiel ni venkos. Ni uzu okazon, ni semu sur ĉiuj kampoj, neniu diru, ke ĉe vi estas malbonaj cirkonstancoj. Laboru, kaj se la semo estos de vi bone semita kaj kulturita, ĝi certe elkreskos, disfloros kaj riĉa rikolto estos via rekompenco. Ni ne ĉesu labori! Se estas Esperanto en grandaj urboj, ĝi devas trapenetri ankaŭ en

ĉiun vilaĝon eĉ en malgrandajn, malriĉajn, laboristajn kabanetojn. Nur tiam ni havos sukceson, kiam ĉiuj laboristoj de la tuta mondo interkompreniĝos, ĉar nur en unueco estas nia forto. Ne prokrastu vian aliĝon. Aliĝilo 2 Kč, tutjara membreco 8 Kč, entute 10 Kč. Nia adreso: Laborista Ligo Esperantista, Plzeň-Peklo, Ĉeĥoslovakio.

Sekcio Plzeň I. Dum majo kaj junio okazas ciklo de esp. paroladoj: 1. Historio de esp. (Jos. Pech). 2. Gramatiko (K. Melková kaj F. Kaiser). 3. Konversacio (J. Pešek). Uzado de esp. (Josef Pech). La parolantojn eventuale anstataŭos: M. Holubová, R. Burda, F. Černý kaj F. Rendl. Regulaj kunvenoj okazas ĉiun jaŭdon je la 20. horo en legejo de Laborista Akedemio (Laborista domo »Peklo«). — Oni decidis multnombre veturi al la II. lab. kongreso en Frankfurt a. M.

Sekcio Plzeň I. malfermis dum monato majo 25an esp. kurson, kiu okazas dufoje semajne vespere en legejo de Lab. Akedemio. Partoprenas 19 lernantoj. La kurson gvidas k-do J. Pech.

Sekcio Plzeň II. (germana). Ĝis nun aliĝis dek anoj, vizitontaj la II. kongreson en Frankfurt. K-do Burda estos delegito.

Sekcio Újezd aranĝis la 9. aprilon amuzan vesperon kun esp. kaj ĉeĥa programoj: deklamo, muziko, kanto. Oni ankaŭ ludis unuaktan komedion. Kunhelpis Lab. kant. soc. el Doubravka. La halo estis plene de esp.-istoj, ĉefe el ĉirkaŭaĵo de Plzeň. La vespereto pro sia bela programo havis grandan sukceson. Per paŝo al paŝo ni atingos la celon!

Doubravka apud Plzeň. La iama »Rondeto« en sia eksterordinara ĝen. kunveno decidis aliĝi al L. L. E. La grupo havas 23 membrojn. Konversaciaj kunvenoj ĉiulunde je 1/220. horo en la malnova lernejo. La membroj estas petataj regule vizitadi la konversaciajn kunvenojn.

Chválenice apud Nezvěstice. Laborista gimnastika asocio aranĝas esp. kurson, kiu partoprenas 19 anoj. La kurson malfermis 14an de majo k-do Jos. Pech el Plzeň en loka lernejo per propaganda parolado. La kurso okazas ĉiudimanĉe antaŭtagmeze. Instruas k-do Jos. Hovorka, membro de L. L. esp. en Plzeň.

II. Tutmonda laborista kongreso de esperanto okazos en Frankfurto, Germanio, la 12—16 de aŭgusto. Laborista ligo esp. elektis jenajn kamaradojn kiel delegitojn: por Ĉeĥoj Josef Pešek, por Germanoj R. Burda, kiu akceptas aliĝilojn kaj prizorgos pasportojn kaj veturbiletojn. Ni atentigas, ke povas ankaŭ partopreni laboristoj ne esperantistoj kiel gastoj. Tutan elspezon kun manĝaĵo kaj diversaj rememoraĵoj oni povas sumigi je 300 Kč. Gekamaradoj, rapidu aliĝi, por ke ni povu tuj informi la gekamaradojn en Frankfurto.

XIV. Universala kongreso de esperanto. Kiel reprezentanton de Lab. ligo esp. oni elektis k-don Josef Pech, Plzeň, Houšková 4, Ĉeĥoslovakio, kiu volonte donos ĉiujn informojn al tiuj, kiuj volas partopreni kongreson. Ankaŭ ni atentigas esp. asociojn, kiuj volus fari propagandajn paroladojn kun lumbildoj en esperanto, antaŭ aŭ post la kongreso, turni sin tuj al k-do J. Pech. Se gekamaradoj el la tuta mondo volas havi kontakton kun ni, skribu pri ĉiuj aferoj al k-do J. Pech. Li ĉion prizorgos.

XIV-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

EN HELSINKI — HELSINGFORS (FINNLANDO),
LA 8.—16. DE AUGUSTO 1922.

(Mallongita.)

Ekskursoj en Finnlando. Multaj kongresanoj alvenos antaŭvideble vendrede antaŭ la kongreso. Por ili estas aranĝata komuna ekskurso al Tampere kun la ĉirkaŭantaj lag-regionoj. Ĉi tiu vojaĝo donas sufiĉe karakterizajn vidaĵojn al la Finnlanda pejzaĝo. La vojaĝkostoj estas en II. klaso 130 mk kaj en III. klaso 90 mk. — Oni atentigas, ke la plej vidindaj lokoj en Finnlando estas Imatra, la plej forta akvofalo en Eŭropo, Punkaharju, belega mallarĝa insulo, Kolimonto kun vastaj imponaj panoramoj, la insulare Valamo en Ladogo, la akvofaloj travureblaj en Oulujoki.

Fakaj kusidoj. Pacifistoj: La Finnlanda Pacifista ligo invitas ĉiulandajn pacifistojn al faka kunsido. Sin turnu al s-o A. Selinheimo, Konstantinkatu 25, Helsinko.

Finnlanda Foiro invitas ĉiujn foirojn partopreni per reprezentantoj, esperante parolantaj, en faka kunsido de la foiroj.

Aliĝo. La LKK konsideris la aferon koncerne karavanoj kun neesperantistaj partoprenantoj kaj faris la jenajn decidojn: a) Kiel kongresanoj estas enskribitaj nur Esperantistoj, b) le neesperantistaj karavanoj aliĝu kiel helpkongresanoj por ricevi la permeson uzi la rabatojn donotajn al la kongresanoj, por partopreni en la festaraĝoj, viziti muzeojn ktp. laŭ samaj kondiĉoj kiel la kongresanoj.

Aliĝoj. Ĝis nun aliĝis 230 personoj el sekvantaj landoj: Germanujo 30, Estonujo 23, Polujo 20, Britujo 18, Nederlando 14, Ĉeĥoslovakujo 10, Francujo kaj Aŭstrio po 7, Hungarujo 5, Italujo 4, Svisio 3, Litvujo kaj Danujo po 2, Svedujo, Hispanujo, Usono, Turkujo, Kanado kaj Japanujo po 1, Finnlando 79, entute 230 aliĝintoj el 20 landoj.

La dato de la kongreso. Kaŭze de tio, ke la Finna Vaporŝipa Kompanio fiksas tute novan veturplanon por la venonta somero, la LKK estis devigata ŝanĝi la daton de la kongreso. Ĝi okazos de la 8.—16. de aŭgusto 1922.

Pasporto. La ekstera ministerio konsentis je tio, ke la kongresanoj ricevu la vizon sen formalajoj, kiam ili montras la kongresan karton kiel legitimumon. Ni atentigas, ke la kongresanoj petu vizon »al Helsinko kaj vojaĝado en tuta Finnlando«, ĉar se ili petas nur vizon al Helsinko, la havigo de vojaĝpermeso por partopreno en ekskursoj kaŭzas perdon de tempo kaj elspezojn. Pri la senformalaj vizo estas sendita ordono al reprezentantoj de Finnlando en diversaj landoj.

Antaŭkongresa ekskurso trans la polusa cirklo. Ni informas, ke telegrafvizoro V. Holopainen, antaŭa del. de UEA en Kristinankaupunki, nun loĝas en Petsamo kaj estas preta gvidi kaj helpi la kongresanojn, kiuj preferas alveni tiun vojon, turisme grandiozan.

Poŝto. La poŝtoŝtampo stampos la elirantan poŝton per aparta stampilo kun teksto »XIV. Universala Kongreso de Esperanto, Helsinko 1922«.

NIA UNUA KONKURSO!

Por akceli emon je esp. verkado inter niaj abonintoj ni anoncas konkurson je felietono por nia gazeto.

Premio: Cent kronoj ĉeĥoslovakaj.

Kondiĉoj: Temo laŭvola de enhavo interesa en maksimuma amplekso de unu paĝo de »La Progreso«. — La artikolo devas esti originala kaj nenie ankoraŭ enpresita.

Tempolimo: Dekkvina septembro t. j.

La premiita felietono estos enpresita en nia oktobra numero. La aŭtoro subskribu sin ne per sia familia nomo, sed nur per devizo! Post la aperigo de la artikolo anoncu al ni la premiitan adreson, kiun ni ankaŭ sciigos al niaj legantoj en la novembra numero. Pri la taŭgeco de la artikoloj juĝos komisiono de Esp. klubo en Plzeň.

oooo

AL NIA LEGANTARO!

La legantaron de »La Progreso« ni informas, ke la komitato de Esp. klubo en Plzeň decidis transdoni la administradon de tiu ĉi gazeto al s-o Jos. Brožík, Plzeň, Prokopova tř. 9., kie de nun troviĝas la administracio. Ĉiuj mendoj de la gazeto kaj de vortaroj estu adresataj sole al li.

La redaktadon de »La Progreso« denove akceptis ĝia malnova redaktoro s-o B. Tittl kaj ni petas adresi al li ĉiujn manuskriptojn por nia gazeto.

Al s-o F. Kavan, la ĝisnuna administristo kaj al s-o Inoc. Gross, la redaktoro, ni esprimas en la nomo de la kluba komitato sinceran dankon pro ilia peniga kaj senlaca laboro.

Jan Pavlík, prezidanto. Ferry Hříbal, sekretario.

oooo

AL LA LEGANTOJ KAJ KUNLABORANTOJ DE „LA PROGRESO“!

Kiel oni sciigas el la supra anonco, la eldonantaro de »La Progreso« denove komisiis min per redaktado de tiu ĉi gazeto. Mi povas diri, ke nur ne volonte mi prenas sur min ĉi tiun nefacilan taskon, kaj se mi faras tion, tiam mi kredas, ke mia peno interesigi la gazeton trovos aprobon de ĝia kunlaborantaro. Mi estas tre danko, se la legantoj de tempo al tempo informos min pri siaj bezonoj en la enhavo de »La Progreso« kaj mi certe penos aranĝi la aferon laŭ iliaj deziro kaj bezono. Al ĉiuj legantoj de »L. P.« mi sendas sinceran saluton, esperante, ke ili fariĝos amikoj ne nur de la gazeto, sed ankaŭ miaj.

B. Tittl.

Ĉeĥoslovakoj abonon

bonan, kaj bele ilustritan gazeton „BRATISLAVSKA POŝTA“ gazeto enhavas esperantan anglulon redaktatan de samideano **Josefina Marečková, Bratislava, Kopáčská 25, Abonprezo Kč 44—jare.**

PRESAĴOJN

EN MODERNA ARANĜO
EN ĈIUJ LINGVOJ LI-
VERAS TRE BALDAŬ

LABORISTA PRESEJO, PLZEŇ,
ROŽMBERSKÁ 1.

LA ESPERANTISTO.

ORGANO DE ESPERANTA
UNIVERSITATO POPOLA.

Dediĉata al la interna ideo de l' Esperantismo.

Jara abono: 8— Kč.

Redakce:
WIEN II., POSTAMT 34.

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas abonon

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.
La gazeto estas ilustrata 16 paĝoj, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio.
Jara abono 45— Kč.

ABONU AL „KATOLIKA MONDO“

(Oficiala organo de „Internacio Katolika“ kaj „Mondjunularo Katolika“, Moka).

Disvastigata en 30 landoj; redaktata sole en Esperanto. Aperas monate.

Jarabono: 10 Kč, 4 svis. fr. 15 germ. m.

Adreso:

GRAZ (AUSTRUJO), KARMELITERPL. 5.

ESPERANTOGRUPOJ ATENTU!

Kiu volas malkare aĉeti esperantajn insignojn, manubutonojn, kravatpinglojn, diversajn belegajn esperantajojn, tiu sendu senprokraste Kč 82.— por tuj ricevi specimenaron — al samideano

H. Röhlich, delegito de U. E. A.,
Jablonec n. N., Wassergasse 7a.

ALIGU AL U. E. A.!!

Dopisnice s obrazem presidenta

T. G. MASARYKA

vydala admin. „La Progreso“

kus 30 hal., 10 kusů 2·70 Kč, 100 kusů 24— Kč.

ESPERANTAĴN SIGELMARKOJN.

insignojn, poŝtkartojn kaj kaŭĉukajn stampilojn liveras

Jozefo Kocourek, gravuristo,

Vieno, X., Arthaber-Platz 3.—14. (Aŭstrio).

Postulu specimenaron de esper. sigelmarkoj kontraŭ 1 Kč. 100 diversajn sigelmarkojn mi liveras po 5 Kč afrankite.

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebongi al

FR. NOVÁK,

horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—, afrankite Kč 37·50.



Kolekto de »La Esperantisto«. N-ro 1.

ZAMENHOFA KURSO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ

ENHAVO:

Antaŭparolo de D-ro L. L. Zamenhof. Gramatiko. Fundamenta ekzercaro kun ĉeĥa traduko. Esperanta-ĉeĥa radikvortaro. Legaĵoj. Anoncoj.

32 dukolone presitaj paĝoj, gazeta formato (30×21 cm), eldono 20.000 ekzempleroj.

Prezo Kč 1.—.

Ĉeideponejo: **R. Čech, vicdel. de U. E. A.,**
Wien IX., D' Orsaygasse 7/23.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. 10. Presis laborista presejo, Plzeň.

